

V-19034/1971



EL POPOLA ĈINIO

人民中國報通

6

1971

Vortoj de Prezidanto Maŭ

La ĉina popolo firme subtenas la popolojn de la tri landoj de Hindoĉinio kaj ĉiuj aliaj landoj tra la mondo en iliaj revoluciaj bataloj kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj.

Gratula Telegramo de Prezidanto Maŭ, Vicprezidanto Lin kaj Ĉefministro Ĝou Okaze de la Granda Venko de la Popoloj de la Tri Landoj de Hindoĉinio

Princo Souphanouvong,

Prezidanto de la Centra Komitato de la Laosa
Patriota Fronto,

Samdek Norodom Sihanuk,

Ŝtatestro de Kamboĝo kaj Prezidanto de la Nacia
Unueca Fronto de Kamboĝo,

Samdek Penn Nouth,

Prezidanto de la Politika Buroo de la Centra
Komitato de NUFK kaj Ĉefministro de la
Reĝlanda Registaro de Nacia Unuiĝo de
Kamboĝo,

Lia Ekscelenco Nguyen Huu Tho,

Prezidanto de la Prezidentaro de la Centra
Komitato de la Naciliberiga Fronto de Suda
Vjetnamio kaj Prezidanto de la Konsilista
Komitato de la Provizora Revolucia Regis-
taro de la Respubliko de Suda Vjetnamio,

Lia Ekscelenco Huynh Tan Phat,

Prezidanto de la Provizora Revolucia Registaro
de la Respubliko de Suda Vjetnamio,

Kamarado Ton Duc Thang,

Prezidanto de la Vjetnama Demokratia Res-
publiko,

Kamarado Le Duan,

Unua Sekretario de la Centra Komitato de la
Labora Partio de Vjetnamio,

Kamarado Truong Chinh,

Prezidanto de la Konstanta Komitato de la
Nacia Asembleo de VDR,

Kamarado Pham Van Dong,

Ĉefministro de la Registaro de VDR,

Lastatempe, la popoloj de la tri landoj de Hin-
doĉinio batalis tre bone sur diversaj batalejoj.

Precipe en la kampanjo de la ŝoseo n-ro 9, ili faris
tre brilajn eksterajn batalojn, eksterajn grandajn
kvantojn da malamikaj vivhavaj fortoj en tutaj
trupunuoj kaj akiris grandan ĝojigan kaj kura-
ĝigan venkon. En la nomo de la Komunista
Partio de Ĉinio, la Ĉina Registaro kaj la ĉina
popolo, ni sendas niajn plej varmajn gratulojn
al vi kaj la tri frataj popoloj de Hindoĉinio.

Tiu venko havas gravan strategian signifon.
Vi disvolvis la nekompareblan potencon de popola
milito, atingis novan nivelon en ĝi kaj akiris
novan sperton. Vi draŝis dolore la usonajn agre-
santojn kaj fiaskigis ilian agresan planon me-
tante la Nixon-registaron en ankoraŭ pli grandan
embarason, tiel ke la tagoj fariĝis por ĝi ankoraŭ
pli malfacilaj. Via venko plene montras ke la
fortoj de la unuiĝo de la popoloj de la tri landoj
de Hindoĉinio estas potencaj kaj nevenkeblaj.

La nuna situacio de Hindoĉinio estas senpre-
cedence bona. Ni firme kredas, ke sub la standardo
de la Plej Alta Konferenco de la Hindoĉiniaj Po-
popoloj, la heroaj popoloj de Laoso, Kamboĝo kaj
Vjetnamio, unuiĝintaj en solida bloko kaj daŭre
persistantaj en popola milito, certe povos venki
ĉiujn ajn malfacilojn kaj gajnos kompletan venkon
en la naciŝava milito kontraŭ la usona agreso.

Maŭ Zedong

Prezidanto de la Centra Komitato de la
Komunista Partio de Ĉinio

Lin Biaŭ

Vicprezidanto de CK de KPC

Ĝou Enlaj

Ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de
la Ĉina Popola Respubliko

Pekino, 29-a de marto 1971

Varman Bonvenon al la Kunbatalantoj Venintaj de la Batalfronto kontraŭ la Usona Imperiismo en Hindaĉinio


La 25-an de marto, la Delegacio de la Labora Partio de Vjetnamio kun Le Duan, la unua sekretario de ĝia Centra Komitato, kiel la estro, atingis Pekinon. Kamaradoj Ĝou Enlaj kaj aliaj varme bonvenigis ĝin sur la aerodromo. La foto montras kamaradon Ĝou Enlaj kaj kamaradon Le Duan.







La 26-an de marto, la Centra Komitato de KPC kaj la Ŝtata Konsilantaro de nia lando aranĝis grandan bankedon por festi la brilan venkon de la tri popoloj de Hindoĉinio en sia naci-sava milito kontraŭ la usona agreso kaj varme honorigi la alvenon de kamaradoj Le Duan, Kaysone Phomvihan kaj profesoro Nguyen Van Hieu al Pekino. La foto montras, ke la gastoj kaj mastroj venas en la bankedan halon.



La 25-an de marto, Ĝou Enlaj, membro de KK de PB de CK de KPC, kaj Jaŭ Venjuan kaj Kiu Hujzuo, membroj de PB de CK de KPC, interparolis kun Kay-sone Phomvihan, estro de la Delegacio de la Laosa Patriota Fronto kaj vicprezidanto de la Centra Komitato de LPF. Jen foto farita antaŭ la interparolo.



La 25-an de marto, Samdek Norodom Sihanuk intervidiĝis kun la Delegacio de la Laosa Patriota Fronto. La foto estas prenita okaze de la intervidiĝo.



La 26-an de marto, kamarado Ĝou Enlaj, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK de KPC, kaj kamaradoj Huang Jongŝeng kaj Kiu Hujzuo, membroj de PB de CK de KPC, interparolis kun kamarado Le Duan, la unua sekretario de CK de LPV, kaj kamarado Nguyen Duy Trinh, membro de PB de CK de LPV. La foto estas prenita antaŭ la komenco de la interparolo.

La 26-an de marto, Ĝou Enlaj, membro de KK de PB de CK de KPC, kaj Kiu Hujzuo, membro de PB de CK de KPC, intervidiĝis kun profesoro Nguyen Van Hieu, membro de la Prezidantaro de la Centra Komitato de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio, kaj Le Quang Chanh, membro de CK de NFSV, kaj Pham Anh Dao kaj Nguyen Thanh Long, sekvantoj de la delegacio. La foto estas farita okaze de la intervido.



Gratulo al la Brilaj Venkoj de la Tri Popoloj de Hindoĉinio en Ilia Nacisava Milito kontraŭ la Usona Agreso

LA Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko okazigis vespere de la 26-a de marto grandiozan bankedon por varme gratuli la tri popolojn de Hindoĉinio pro la brilaj venkoj en ilia nacisava milito kontraŭ la usona agreso kaj varme bonvenigi la alvenon al Pekino de kamarado Le Duan, la unua sekretario de la Centra Komitato de la Labora Partio de Vjetnamio, kamarado Kaysone Phomvihhan, vicprezidanto de la Centra Komitato de la Laosa Patriota Fronto kaj profesoro Nguyen Van Hieu, membro de la Prezidantaro de la Centra Komitato de Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio.

Samdek Norodom Sihanuk, la ŝtatestro de Kamboĝo kaj prezidanto de la Nacia Unueca Fronto de Kamboĝo, kaj lia edzino ĉeestis la bankedon laŭ invito.


Invititaj al la bankedo kaj sidantaj kune kun Samdek Sihanuk kaj lia edzino, kamarado Le Duan, kamarado Kaysone Phomvihhan kaj pro-

fesoro Nguyen Van Hieu ĉe la sidejo por ĉefaj gastoj estis aliaj vjetnamaj kaj laosaj kunbatalantoj kaj koreaj kunbatalantoj:

Kamarado Nguyen Duy Trinh, membro de la Politika Buroo de CK de LPV, vicĉefministro de la registaro kaj ministro de eksteraj aferoj; kamarado Ha Huy Giap, membro de CK de LPV, vicestro de ĝia propaganda departemento kaj vicministro de kulturo de la registaro, kaj kamarado Ngo Thuyen, alterna membro de CK de LPV kaj ambasadoro de la Vjetnama Demokratia Respubliko al Ĉinio;

Le Quang Chanh, membro de CK de NFSV, kaj Tran Binh, provizora aferŝargito de la ambasado de la Respubliko de Suda Vjetnamio al Ĉinio;

kamaradoj Sanan Southichack kaj Maysouk, membroj de CK de LPF; kamarado Thong Savath Kay Kham Phi Thoune, vicdirektoro de la Ĝenerala Oficejo de CK de LPF, kaj la laosaj ĝeamikoj en Pekino ĝeneralo Huon Mongkhunvilay kaj lia edzino; kaj



kamarado Hen Ĝun Ge, ambasadoro de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio al Ĉinio, kaj lia edzino.


Ĉeestis la bankedon gvidantaj kamaradoj de niaj partio kaj ŝtato: kamarado Ĝoŭ Enlaj, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de CK de KPCĈ kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro; kamarado Huang Jongŝeng, membro de PB de CK de KPCĈ kaj ĉefo de la Ĝenerala Stabo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo; kamarado Jaŭ Venjuan, membro de PB de CK de KPCĈ; kamarado Li Hiannian, membro de PB de CK de KPCĈ kaj vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro; kamarado Vu Fahian, Li Zuopeng kaj Kiu Hujzuo, membroj de PB de CK de KPCĈ kaj vicĉefoj de la Ĝenerala Stabo de ĈPLA; kamarado Gi Dengkuj, alterna membro de PB de CK de KPCĈ; kamarado Li Deŝeng, alterna membro de PB de CK de KPCĈ kaj direktoro de la Ĝenerala Politika Departemento de ĈPLA; kamarado Vang Donghing, alterna membro de PB de CK de KPCĈ kaj kamarado Guo

Mojuo, membro de CK de KPCĈ kaj vicĉefkomitato de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Rerezentantoj.

La bankedo okazis en la impona kaj bela Popola Halo.

Kamarado Ĝoŭ Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, faris paroladon en la bankedo. En la nomo de Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Biaŭ kaj en la nomo de CK de KPCĈ, la ĉina registaro kaj la ĉina popolo, li esprimis varman bonvenigon al kamarado Le Duan, kamarado Kaysone Phomvihan, profesoro Nguyen Van Hieu kaj aliaj vjetnamaj kaj laosaj kunbatalantoj, kiuj venis de la fronto de la nacistava milito kontraŭ la usona agreso en Hindoĉinio kaj plej varme gratulis la tri popolojn de Hindoĉinio pro iliaj brilaj venkoj en la nacistava milito kontraŭ la usona agreso.

Kamarado Ĝoŭ Enlaj diris: “La ĉina popolo varme aklamas la brilajn venkojn akiritajn de la popoloj de Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo. Ni



esprimas niajn plej varmajn gratulojn kaj plej altan estimon al niaj kunbatalantoj sur la fronto kontraŭ la usona agreso.

“La usona imperiismo ne volantas akcepti sian malvenkon kaj ankoraŭ faras furiozan barakton. Nun, Nixon-registaro unuflanke fabrikas mensogojn por kaŝi sian malvenkon kaj aliflanke furioze bombadas la Vjetnaman Demokratian Respublikon kaj eĉ preparas novan militan aventuron. Precipe en la seka sezono de la ĉijara vintro kaj la venontjara printempo, ĝi ankoraŭ entreprenos eĉ pli grandan militan aventuron kaj faros la finan barakton por reelektiĝo de Nixon en la venonta balotado pri prezidanteco. Sed ni firme kredas, ke antaŭ la unuiĝo kaj batalo de la tri popoloj de Hindoĉinio, la usonaj agresantoj ne povos savi sin el la fatalo de malvenko, kian ajn militan aventuron ili faros.”

Kamarado Ĝou Enlaj emfazis ĉe la fino de sia parolado: “Firme sekvante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la ĉina popolo senŝanceliĝe plenumos sian proletaran internaciis-

man devon, plenforte subtenos kaj helpos la tri popolojn de Hindoĉinio en ilia nacisava milito kontraŭ la usona agreso, firme subtenos la korean popolon en ĝia batalo kontraŭ la usona agreso por la unuiĝo de la patrolando, kaj firme subtenos la popolojn de Azio kaj la tuta mondo en iliaj revoluciaj bataloj. Ĉinio firme decidis unuiĝi kun la popoloj de la tuta mondo kaj batali kune kun ili por komplete venki la usonajn agresantojn kaj ĉiujn iliajn lakeojn.”

Kamarado Le Duan, la unua sekretario de CK de LPV, parolis al la bankedo.

Li diris: “La brilaj militaj atingoj en suda Laoso, sur la ŝoseo n-ro 9, en Khe Sanh, en Kratie kaj Kompong Chan estas brila sukceso de la neŝancebla decidemo de la vjetnama, laosa kaj khmera popoloj forte unuiĝintaj inter si por venki la usonajn imperiistajn agresantojn, laŭ la spirito de la Plej Alta Konferenco de la Hindoĉiniaj Popoloj. Tiu sukceso estas nedisigebla kun la plenforta subteno de la frata ĉina popolo. Ĝi



En bankeda salono

estas brila venko de la perfekta solidareco inter la hindoĉiniaj popoloj kaj la 700-miliona ĉina popolo, kiuj luktas kaj venkas kune en la batalo kontraŭ la komuna malamiko, la usona imperiismo.”


Kamarado Le Duan diris je la fino: “Nuntempe, la mondaj revoluciaj fortoj estas en ofensiva pozicio; ili certe frakosas ĉiujn militemajn kaj agresajn intrigojn kaj agojn de la usonaj imperiistoj. Ĝuste kiel Prezidanto Maŭ diris: ‘**Ne la vjetnama popolo, la laosa popolo, la kamboĝa popolo, la palestina popolo, la arabaj popoloj kaj la popoloj de ĉiuj aliaj landoj en la mondo timas la usonan imperiismon, sed la usona imperiismo timas la popolojn de ĉiuj landoj en la mondo.**’

“Ni profunde konvinkiĝis, ke la justa revolucia afero de la popoloj de Vjetnamio kaj Hindoĉinio

nepre venkos. La ĉina popolo nepre liberigos sian Tajvan-provincon, neapartigeblan teritorion de la Ĉina Popola Respubliko, kaj la korea popolo nepre unuigos sian patrolandon. La usonaj imperiismaj agresantoj nepre malvenkos!”

Kamarado Kaysone Phomvihon, vicprezidanto de CK de LPF, faris paroladon en la bankedo.

Li diris: “Venante de la fronto de batalo kontraŭ la usona agreso por fari amikan viziton en la granda Ĉina Popola Respubliko, nia delegacio de la Laosa Patriota Fronto sentas grandan ĝojon kaj honoron pro la varma akcepto farita al ni de la gvidantaj kamaradoj de la Partio kaj registaro de Ĉinio. Ĉe tiu ĉi granda kaj signifoplena bankedo, ni transdonas al vi la salutojn kaj batalajn solidarecon kaj amikecon montritajn de la laosa



popolo por la granda ĉina popolo, kiu ĉiam alte tenas la standardon de opono kontraŭ imperiismo, koloniismo kaj nova koloniismo, kun la usona imperiismo ĉe la kapo, aktive subtenas la naciliberigajn movadojn kaj revolucionan aferon de la mondo kaj aktive kaj firme subtenas kaj helpas la laosan popolon en ĝia nacistava batalo kontraŭ la usona agreso.

“Profitante tiun ĉi ŝancon, mi esprimas en la nomo de la laosa popolo korajn dankojn al la respektinda kaj amata granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong, la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉinaj registaro kaj popolo.”

Kamarado Kaysone Phomvihhan daŭrigis: “Sub la gvido de la Laosa Patriota Fronto, estrata de Princo Souphanouvong, la laosaj armitaj fortoj

kaj popolo disvolvis heroan nacistavan batalon kontraŭ la usona agreso, ripetade faris aktivajn atakojn kontraŭ la malamiko kaj frakasis multajn mordetajn invadojn de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj al la liberigitaj regionoj. Tiuj regionoj estas senĉese firmigataj kaj vastigataj kaj serioj da gravaj venkoj estas gajnitaj.”

Kamarado Kaysone Phomvihhan diris je la fino: “La kunordigita batalo de la frataj laosa, vjetnama kaj khmera popoloj kaj iliaj grandaj venkoj akiritaj en la areo de la ŝoseo n-ro 9 kaj aliaj lokoj jam donis pezajn batojn al la usona intrigo por daŭrigi kaj vastigi la militon en Hindoĉinio, al ĝia intrigo de batalo kontraŭ hindoĉinianoj per hindoĉinianoj, al ĝia plano de “vjetnamigo” de la milito, kaj al la agresa ambicio de la usona imperiismo kaj ĝiaj

sajgonaj pupoj. Rezulte de tio la dekstrulaj trupoj ĉiam pli deprimiĝis kaj panikiĝis. La supre diritaj venkoj estas venkoj de la saĝa kaj ĝusta politika kaj milita linio, venkoj de la batala unuiĝo en vivo kaj morto inter la tri popoloj de Laoso, Vjetnamio kaj Kamboĝo, kaj estas brila rezulto de la Plej Alta Konferenco de la Hinduĉiniaj Popoloj. Tiuj venkoj surbazigis novan strategian superecon por la tri frataj popoloj de Laoso, Vjetnamio kaj Kamboĝo en sia racisava batalo kontraŭ la usona agreso, malfermis antaŭ ili belajn perspektivojn por la estonto kaj ĝojigis kaj kuraĝigis niajn amikojn tra la mondo.

“Honorindaj gastoj, kamaradoj kaj amikoj! Ni scias, ke la usona imperiismo estas obstina kaj aventurema. Sed la 50-miliona hinduĉinia popolo firme decidis batali ĝisfine, ĝis la usona imperiismo estos forpelita el Hinduĉinio. Ne pre venkos la popoloj de Laoso, Vjetnamio kaj Kamboĝo! Ne pre malvenkos la usona imperiismo!”

Profesoro Nguyen Van Hieu, membro de la Prezidentaro de CK de NFSV, faris paroladon ĉe la bankedo.

Li diris: “Vjetnamio kaj Ĉinio estas frataj landoj, kies montoj kaj riveroj interligiĝas. En la rezistmilito kontraŭ la agreso de la usona imperiismo, nia popolo en la sudo, same kiel la tuta vjetnama popolo, ĉiam ricevas plenajn kaj grandajn simpation kaj subtenon de la ĉinaj Partio kaj registaro kaj la frata ĉina popolo. Precipe, la lasta amika vizito de la Ĉina Partia kaj Registara Delegacio, estrata de Ĉefministro Ĝou Enlaj, al norda Vjetnamio estis grandega kuraĝigo kaj mobilizo por ni, kreskigante al ni plian grandan forton en nia batalo por frakasi ĉiujn novajn intrigojn de la usona imperiismo kaj doni pli fortajn batojn al ĝia plano de ‘vjetnamigo’ de la milito. La vortoj plenaj de profunda amikeco en la Komuna Komunikado de la du partioj kaj du registaroj refoje manifestis la decidemon de la ĉina popolo fari grandegan subtenon kaj helpo al nia vjetnama popolo en nia afero de nacisava rezisto kontraŭ la usona agreso.”

Profesoro Nguyen Van Hieu daŭrigis: “Kun firma decido sekvi la sanktan testamenton de nia respektinda kaj amata Prezidanto Ho Chi Minh, niaj armitaj fortoj kaj popolo en suda Vjetnamio marŝos antaŭen en venko kaj batalos tutkore kaj unuanimeme kun la 20 milionoj da sangfratoj en la Nordo, ĝis la usonaj fortoj komplete fortiriĝos kaj la pupaj fortoj kaj pupa reĝimo komplete kolapsos, por

liberigi la Sudon, defendi la Nordon kaj plie pace unuigi la patrolandon.

“Fidela al sia promeso en la Komuna Deklaracio de la Plej Alta Konferenco de la Hinduĉiniaj Popoloj, la sudvjetnama popolo volonte unuiĝos pli kompakte kun la frataj popoloj de Kamboĝo kaj Laoso kaj firme persistos en la nacisava milito kontraŭ la usona agreso kaj forte ĝin akcelos ĝis la usona imperiismo estos komplete forpelita el la Hinduĉinia Duoninsulo, kaj tiel faros kontribuon al la defendo de la paco en Azio kaj la mondo.”

Samdek Norodom Sihanuk, ŝtatestro de Kamboĝo kaj prezidanto de la Nacia Unueca Fronto de Kamboĝo, faris paroladon ĉe la bankedo.

Li diris: “La usona prezidanto Nixon uzas ĉiujn siajn disponeblajn militajn kaj materialajn rimedojn kaj homajn fortojn en grandaj kvantoj por gajni ĉi tiun tre gravan kampanjon, kion li revis deposedi la hontinda malvenko en sia agresa milito feroce planita por redukti Kamboĝon al nova kolonio. Tiu kampanjo devus esti ‘Austerlitz’ por la usona imperiismo kaj Nixon, sed rapide ĝi fariĝis tre hontinda ‘Waterloo’. Tion ni dankas al la eksterordinaraj heroismo, saĝo, patriota fido, lerteco en bataltekniko kaj milita scienco de la popolaj armitaj fortoj de Vjetnamio kaj Laoso kaj iliaj elstaraj gvidantoj.

“Tiu ilia venko estas komparebla kun la venko de Dien Bien Phu, kiu estas neforgesebla kaj havas altan historian signifon, trovas koran admiron de ĉiuj popoloj de la mondo, inkluzive de la usona, kaj estas ore enskribita por ĉiam en la historio pri la ekstreme glora batalo kondukata de la diversaj popoloj de Hinduĉinio por savi sian nacion, la liberecon de Hinduĉinio kaj la ŝtatan suverenecon de siaj respektivaj landoj.

“Tiu venko markas decidigan turnopunkton en tiu ĉi granda milito de Hinduĉinio. La usona imperiismo kaj Nixon provokis tiun batalon, kies rezulto tamen malfermis larĝe al la tri popoloj de Hinduĉinio la ‘pardon’ kondukantan al novaj grandaj venkoj, kiuj komencos entuziasmigan stadion, kiu venigos la finan venkon al tiuj popoloj kaj kompletan malvenkon al la usona imperiismo.”

Ĉiuj paroladoj ĉe la bankedo vekis foje-refoje ŝtormojn da varmaj manklakoj.

La bankedo por celebri la grandan venkon akiritan de la tri popoloj de Hinduĉinio en sia nacisava milito kontraŭ la usona agreso finiĝis en la muziko *Certe Venkos la Popoloj de la Tuta Mondo*.

Rumana Registara Delegacio Vizitis Ĉinion

Kamarado Gheorghe Radulescu, membro de la Plenuma Komitato kaj de la Konstanta Prezidantaro de la Centra Komitato de la Rumana Komunista Partio kaj vicprezidanto de la Konsilantaro de Ministroj de la Rumana Socialisma Respubliko, kaj la Rumana Registara Delegacio sub lia gvido venis al Pekino je la 19-a de marto por fari amikan vizitadon en nia lando laŭ invito de nia registaro kaj ricevis nian varman akcepton. La 29-an de la sama monato, ili revenis al Bukaresto, kunportante profundan amikecon de la ĉina popolo al la rumana popolo.

Ĉinio kaj Rumanio estas amikoj kiuj dividas inter si zorgon kaj malfacilon en batalo kontraŭ agreso kaj por sendependeco kaj memdecido. La popoloj de Ĉinio kaj Rumanio simpatias kaj interhelpas reciproke kaj starigis profundan revolucion amikecon surbaze de Marksismo-Leninismo kaj proletara internaciismo. La ĵus farita vizito de la Rumana Registara Delegacio al nia lando pliapaŝe fortigis la amikan kaj kunlaboran rilaton inter Ĉinio kaj Rumanio.

Kiam la rumanaj honorindaj gastoj forlasis Pekinon por viziti sudan Ĉinion, kamarado Li Hiannian, membro de la Politika Buroo de CK de KPĈ kaj vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, kamarado Kiu Hujzuo, membro de la Politika Buroo de CK de KPĈ kaj vicestro de la Ĝenerala Stabo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kaj miloj da revoluciaj popolanoj de nia ĉefurbo kolektiĝis sur la aerodromo por varme adiaŭi ilin.






Supre: La 22-an de marto, kamarado Ĝou Enlaj, membro de la Politika Buroo de CK de KPC kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, kaj aliaj kamaradoj intervidiĝis kun la Rumana Registara Delegacio.

Sube maldekstre: Interkonsentoj inter la ĉina kaj rumana registaroj pri livero de kompletoj de ekipaĵoj kaj teknikaj helpoj de Ĉinio al Rumanio estas subskribataj en Pekino.

Sube dekstre: Norodom Sihanuk, ŝtatestro de Kamboĝo, intervidiĝas kun Gheorghe Radulescu. La interparolon ĉeestas Aurel Duma, la rumana ambasadoro al Ĉinio.







La nepalaj honorindaj gastoj intervidiĝas kun la bonvenigantaj revoluciaj amasoj, sub akompanado de Guo Mojuo, vicĉefkomitatano de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Re prezentantoj, kaj Li Hiannian, vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro.

Longe Daŭros la Tradicia Amikeco inter la Ĉina kaj Nepala Popoloj

Ram Hari Sharma, prezidanto de la Nepala Tutlanda Panchayat, kaj lia edzino kaj la Amika Delegacio de la Nepala Tutlanda Panchayat sub lia gvido atingis Pekinon je la 20-a de marto por fari amikan viziton al nia lando, laŭ la invito de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Re prezentantoj de la Ĉina Popola Respubliko kaj estis varme bonvenigataj. La delegacio revenis al Katmanduo je la 4-a de aprilo.

Ĉinio kaj Nepalo estas intimaj najbaroj kaj la popoloj de la du landoj havas inter si longan tradician amikecon. La Amika Delegacio de la Nepala Tutlanda Panchayat alportis la profundan amikecon de la nepala popolo al la ĉina popolo kaj ĝia vizito akcelis pluan disvolviĝon de la amika kaj kunlabora rilato inter Ĉinio kaj Nepalo.



La 21-an de marto, Ĝou Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, Guo Mojuo, vicĉefkomitatano de KK de TKPR, kaj vicĉefministro Li Hiannian intervidiĝis kun la membroj de la Amika Delegacio de la Nepala Tutlanda Panchayat kaj samtempe ankaŭ kun la membroj de la Tablotenisa Teamo de Nepalo vizitanta nian landon.



Ĉinaj kaj nepalaj tablotenisistoj post amika maĉo.



Prezidanto Ram Hari Sharma kaj lia edzino donis adiaŭan bankedon je la 23-a de marto. Ĉefministro Ĝou Enlaj, Vicĉefkomitatano Guo Mojuo kaj Vicĉefministro Li Hiannian ĉeestis la bankedon laŭ invito. La foto montras ke la gastigantoj kaj la gastoj venas en la bankedan salonon.


Ordigantoj de la Rivero Hajhe

EN vintro de 1970, centmilnombra laborarmeo venis amase al la ebenejo kun areo de cent lioj longa kaj larĝa en sudorienta Pekino, por komenci la batalon de ordigo de la norda akvosistemo de Hajhe.

Hajhe estis fame konata kiel malutila rivero en la historio de nia lando. La tuta baseno de Hajhe kun ĝiaj branĉoj okupas pli ol 70% de la teritorio

de la provinco Hebej. En 1963, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ alvokis: “Nepre ordigi radikale la riveron Hajhe.” Al tiu alvoko la popolo de Hebej aktive respondis. Ili formis grandan laborarmeon, kaj post sepjara malfacila batalado, sukcesis ordigi la kvin ĉefajn riverojn de la suda kaj okcidenta akvosistemoj de Hajhe, tiel ke giganta ŝanĝo okazis al la rivero malutila de miloj da jaroj. Pri tio ni jam raportis en n-ro 2 de la kuranta jaro.

Virinoj laborantaj sur la Hajhe-rivera konstruejo



Por radikale ordigi Hajhe, komenciĝis en vintro de 1970 la enjungado de la riveroj de ĝia norda akvosistemo. Tie la tereno estas malalta kun grand-areaj fragmitejoj kaj multaj stagnaj akvoj. La laboro estis tre malfacila. La centmilnombra laborarmeo batalis kontraŭ la naturo en vintra frostoj, kiam blovis sablovento kaj sternaĝis sub la piedoj glaciaj akvoj. Oni laboregis kun arda fervoro, demetinte la vatitajn vestojn en tranĉe malvarma vento. Ĉie flirtis ruĝaj flagoj kaj aŭdiĝis sonoraj revoluciaj kantoj. Post laboro oni kune lernis verkojn de Prezidanto Maŭ kaj parolis pri siaj lernoakiroj en budoj. En la tuta laborloko montriĝis grandioza sceno viva kaj entuziasmiga.

Oni eble demandos: “Kiaj estis tiuj sinforgese laborantaj personoj? Kion ili pensis en sia kapo?”

ZORGADO PRI LA REVOLUCIO

Kiam la informo pri la komenco de la ordigo de la rivero venis al Laŭjugoŭ-komunumo de Ĉangping norde de Pekino, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj konkure sin anoncis por partopreni la laboron, volante iri en la unuaj vicoj responde al la alvoko de Prezidanto Maŭ.

La komunumo situas en profunda montregiono kaj ne povas profiti el la laboro. Sed, kial ili tiel aktive dediĉis sin por fosi la riverliton? Tion oni devas klarigi ekde la kunveno okazigita de la milica bataliono de la komunumo.

La partia filio de la milica bataliono kunvokis kunvenon por diskuti pri la problemoj, ĉu oni partoprenu la laboron de ordigo de la rivero. La maljuna eksgerilano kaj kompartiano Baj Ĝaŭkuan ekstaris kaj rakontis pri la batalado de la Okavoja Armeo kaj gerilanoj en Laŭjugoŭ kontraŭ la japanaj agresantoj. Emocie li parolis pri la heroo martiriĝo de la gerila taĉmentestro, kiu kuraĝe batalis por liberiĝo de la nacio. Li dolore diris: “La gerila taĉmentestro ne estis Laŭjugoŭano. Kial li oferis sian vivon en nia loko? Por liberiĝo de la popolo! Nia loko estas malnova revolucia regiono; ni nepre devas lerni de niaj revoluciaj antaŭuloj kaj marŝas antaŭen sekvante iliajn sangajn spurojn!”

La sekretario de la partia filio Ŝan Fuhaj daŭrigis: “Kamarado Bethune estis kanadano fore de ni trans oceano. Kial li venis por helpi nin en milito kontraŭ la japana imperiismo kaj oferis

sian vivon? Ja por liberiĝi la popolojn de Ĉinio kaj la mondo! Ni ne devas fiksi niajn rigardojn nur al nia malgranda montvalo! Bone enordigi Hajhe pliigos grenprodukton, per kiu oni subtenos konstruadon de nia lando kaj la mondan revolucion. Tio estas nia revolucia devo.”

La kunvenejo ekbolis per la krioj: “Por la revolucio fosu la riverliton kaj ordigu la fluon!”

Tuj estis organizita taĉmento el 180 milicanoj por tiu laboro. Por hardi sian revolucionan volon, ili marŝis 250 liojn en du tagoj kaj atingis la laborlokon.

Ili prenis la taskon de fosado de 52-metra sekcio. Sub la gvido de la partia filio, ili laboris kun granda energio kaj fariĝis la unua avangarda unuo de Ĉangping, kiu plenumis sian taskon en altaj kvalito kaj rapideco.

Estis finplenumita la tasko. Kion oni faru nun? Lerninte la brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ *Daŭrigu la Revolucion ĝis la Fino* k. a., ili ekpensis ke la tuta popolo nun konstruas la grandan socialisman patrolandon kun ardanta fervoro, kaj ilia 52-metra fosado estas nur eta kontribuo en la ĉina revolucio, kaj ke en la mondo estas ankoraŭ milionoj kaj milionoj da popolanoj kiuj suferas subpremadon, kaj ilia 52-metra fosado estas nur malgranda kontribuo en subteno de la monda revolucio.

Tiel, ili petis de la direktoro novan taskon.

PLENA DE FORTOJ POR TIRI REVOLUCIAN ĈARON

Inter la vicoj de la laborarmeo estis milicanoj venintaj de la hejmloko de la elstara batalanto de la proletaro Vang Guofu — Dabajloŭ-grupo de la Popol-komunumo de Amikeco inter Ĉinio kaj Koreio. Ili ĉiuj tenas en sia memoro la vorton de sia karmemora grupestro: “Tiri la revolucionan ĉaron sen malstreĝigo de la tirrimeno ĝis efektiviĝo de komunismo.”

La riverlito fariĝis ĉiam pli profunda sub diligenta fosado. La Dabajloŭ-anoj devis fosi drenan kanalon por forkonduki akvon. Ĉar ilia laboro progresis pli rapide, sekve akvoj de la najbaraj sekcioj alfluis kun sablo kaj tero, tiel ke la kanalo estis plenigita de sedimentaĵo tuj en la sekvinta tago. Oni fosis la kanalon denove, sed ripetiĝis la malbono. Kion fari?

La maljuna taĉmentestro Liu Kujvu demandis la milicanojn: “Kiel agis nia forpasinta grupestro Vang Guofu, kiam nian lokon atakis inundo?”

“Li breĉis la digon ĉe nia vilaĝo, lasante la torentegon forflui tra nia vilaĝo, por protekti la havaĵon de la ŝtato kaj plantojn de aliaj vilaĝoj.”

“Jes! Nia karmemora grupestro havis tian vastan koron, do ankaŭ ni devas tiel agi. Ni laboras super tiu ĉi sekcio, sed nia rigardo devas ampleksi la tutan riverordigan laboron, la tuton de la revolucia afero. La fosota tero devas esti forportita. Unu ĉaro da tero forportita signifas unu-paŝan proksimiĝon al plenumo de la tasko. Estas egale, kiu ĝin forportas.”

La labortaĉmento de Dabajloŭ triafoje fosis drenan kanalon pli profundan kaj pli larĝan ol antaŭe. Kiam la Dabajloŭ-anoj vidis, ke la stagnaj akvoj el najbaraj sekcioj forfluis tra la kanalo kaj sur granda areo malaperis malsekaj termasoj, ili eklaboris kun pli granda energio.

Baldaŭ finiĝonta estis la laboro de netigo de la bordodeklivo. Liu Kujvu serioze kontrolis la kvaliton de la laboro kaj trovis ke sur la deklivo estas enmetitaj glaciigitaj termasoj. Li kunvokis la taĉmentanojn kaj voĉlegis al ili la instruon de Prezidanto Maŭ: **“La spirito de kamarado Bethune, lia kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem, elmontriĝis en lia ekstreme respondecema sento al la laboro kaj lia ekstreme varma koro al kamaradoj kaj la popolo. Ĉiu kompartiano devas lerni de li.”** Kaj tiam li montris al la aŭskultantoj la glaciigitajn termasojn, dirante: “Jen estas frostitaj termasoj, kiuj defalos mem, kiam ili degelos en la venonta printempo. Ni ne devas postlasi ian ajn eblecon al akvega katastrofo por ke ĝi damaĝu la lokajn malriĉkamaranojn kaj malsuperajn mezkamaranojn.”

“Ni lernu de kamarado Bethune! Defosu ni la parton nekonforman al la normo kaj ĝin refaru!”

Kaj ili elfosis la glaciigitajn termasojn kaj ilin anstataŭigis per bona tero.

SINDONEMO AL LA KOLEKTIVO

Ĉiutage en frua mateno, multaj laborantoj venis al la laborloko trans la rivero Venjuhe. Iutage subite aŭdiĝis krio sur pramo meze de la rivero, ĉar akvo enfluis la tro ŝarĝitan pramon: minacis danĝero.

En tiu momento iu solbrakulo sur bordo la unua sin ĵetis en la riveron.

Estis kablo ambaŭfine fiksita sur la bordoj, kiun la pramistoj tiris por movi la pramon. Starante en la profunda malvarma fluo, la solbrakulo ŝultroportis la kablon. Li laŭte recitis la instruon de Prezidanto Maŭ **“faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon”**, kaj alvokis la homojn sur la pramo veni al la bordo kroĉante sin al la kablo.


Tiu homo estas la kompartiano Li Ŝihi el la milica regimento de Hinghuo-komunumo de Ĉaŭĵang-distrikto. Li partoprenis la konstruadon de la akvo-konservejoj de Ŝisanling kaj Mijun nemalproksime de Pekino kaj estis malnova laborheroo de akvoutiliga fronto de Pekino konata inter la amasoj sub la nomo Solbraka Heroo. Siatempe sur la laborloko en Ŝisanling li vidis propraokule la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ ŝoveladi teron en portkorbojn. Prezidanto Maŭ estis tiom sana kaj vigla ke lia vizaĝo brilis ruĝe. Emocie Li Ŝihi ĵuris en si: **“Ho Prezidanto Maŭ! Dum la tuta vivo, mi Li Ŝihi revolucios ĉiam sekvante vin!”** Energio plenigis la korpon de Li Ŝihi. Per sia sola brako li ŝoveladis rapide kaj bone kaj puŝis ĉaron lerte kaj stabile, tiel ke eĉ junuloj ne povis lin superi. **“Por la revolucio kaj komunismo,”** li diris, **“mi flanken metas personajn konsiderojn kaj pretas oferi mian vivon en laborado!”**

Kiam Li Ŝihi laboris fervore super sia tasko, li estis informita ke lia maljuna patrino malsaniĝis kaj atendis lian revenon por aranĝi kuracadon en hospitalo. Li Ŝihi reiris al la hejmo kaj post kiam lia patrino estis portita en hospitalon li tuj pretis reiri al la laborloko.

La maljunulino diris ameme al sia filo kun karesa rigardo: **“Tranoktu hejme. Via farto ne estas tiom bona . . .”**

Li Ŝihi interrompis ŝian parolon dirante: **“Panjo, memoru ke ni ne povis ricevi kuracon pro manko de mono antaŭ la Liberiĝo, kiam japanaj diabloj batis mian patron al blindeco kaj mia brako estis rompita sub rado de lokomotivo dum kolektado de ne-finbruligitaj karbopecoj. Ĉu nia familio povus havi feliĉan vivon kiel la nunan sen Prezidanto Maŭ? Nun Prezidanto Maŭ alvokas nin al radikala ordigo de Hajhe por forigi inundojn, ĉu mi povus forlasi mian batalan postenon antaŭ la plenumiĝo de la tasko?”**

En profunda nokto li revenis sur biciklo al la laborloko, post kiam la maljunulino estis konvinkita de la filo.



Kluzo por elasi superakvegono — unu el la konstruoj de Hajhe-rivero.

LU KING:

Ŝi Ĉiam Estas Ordinara Laborulo

— Pri la Tutlanda Labormodelo Haŭ Gianhiu

EN la Granda Proletara Kultura Revolucio, la fama labormodelo de nia lando kamaradino Haŭ Gianhiu estis elektita kiel respondeculo de la revolucia komitato de la Oka Ŝtata Kotona Ŝpinteksejo de Kingdaŭ. Dum la pasintaj kelkaj jaroj, ŝi persistis en nedisiĝo de la praktiko, fizika laboro kaj la amasoj. Ĝis nun ŝi ankoraŭ povas konkursi kun la plej lertaj laboristoj pri rekunigo de rompitaĵoj aŭ pri funkciigo de maŝinoj. Ni rakontu al vi ĉi tie, kiel ŝi konservas al si la naturon de labormodelo, post kiam ŝi fariĝis gvidanta kadro.

I

“En kiu laborejo vi estas, kamaradino Haŭ Gianhiu? Sciigu telefone al la oficejo!” eksonis voĉo de la kamaradino de la fabrika fadena disaŭdiga stacio.

En tiu tago, Haŭ Gianhiu eliris kun inĝeniero por partopreni kunvenon pri kotonŝparado. Reveninte al sia fabriko, la inĝeniero volis diskuti la kotonŝparan problemon post iom da ripozo. Sed Haŭ Gianhiu malaperis neatendite je palpebrumo. Rigardinte al ŝia tablo, li tuj sciis ke ŝi jam iris al laborejo. Ĉar ordinaro sur ŝia tablo troviĝas krom verkoj de Prezidanto Maŭ ankaŭ labor-antaŭtuko. Se tiu vesto malaperis, certe ŝi iris en ĝi al laborejo. La inĝeniero pensis en si: Se mi serĉos ŝin en laborejoj laŭvice, tio bezonas multe da tempo; se mi demandas telefone al la laboreja oficejo, tio ankaŭ ne helpas min, ĉar ŝi kutime ne restas tie. Do, la plej bona rimedo estas voki ŝin pere de la fadena disaŭdigilo.

Trovinte Haŭ Gianhiu ĉe la kotonpurigejo, la inĝeniero vidis ke ŝi jen grimpas sur la altan polvokolektan turon por ekzameni, kiom da uzeblaj kotonfibroj estas miksitaj en la elŝprucintaj polveroj, jen kuras al la kotonpuriga maŝino por

observi la aerofluon kaj misforportatajn kotonfibrojn. Ŝiaĵo kaj vestoj estis plene kovritaj de polvo kaj kotonlanugo. Ekvidinte la inĝenieron, ŝi ĝoje petis lin kaj la laboristojn diskuti kune kun ŝi pri kotonŝparo, montrante al ili diversajn specimenojn de misforportita koton.

En tiu periodo Haŭ Gianhiu kaj la inĝeniero ĉiutage partoprenis fizikan laboron en la sekcioj de purigo kaj kardo de koton. Dum konkreta praktiko ili kontrolis ĉiujn maŝinojn kaj fine plibonigis kune kun la laboristoj la teknologion. La koton ŝparita de ili en du monatoj sufiĉis por produkti pli ol 150 pakojn da fadenoj.

Senĉese sorbante nutraĵojn el la amasoj, Haŭ Gianhiu konscie reformas sian mondkoncepton en kuna laborado kun la laboristoj.

Por pliprodukti bonkvalitajn ŝtofojn kaj plurope kuntorditajn fadenojn, estas necese altigi la rapidecon de la ŝpinaj kaj teksaj maŝinoj. Sed la maŝinoj estis tre malnovaj kaj jam ne povis plirapidiĝi. Kion fari? Haŭ Gianhiu kune kun la laboristoj tuj komencis reformi la maŝinojn en la nokto. Ŝi persone manipulis maŝinon por fari provon. Post 4-hora streĉa batalo ili finis la taskon kaj altigis la laborefikon je 16%. Ili ne nur liveris pli multe da fortika kotonfadenado por eksporto, sed ankaŭ per tio garantiis la sukcesan provprodukton de 8 novaj specoj de bonkvalita ŝtofo en mallonga tempo.

II

Haŭ Gianhiu ofte diras: “La laboristoj ĉiutage laboras por la revolucio. Tial zorgi pri ili signifas zorgi pri la revolucio.” Post sia deĵoro ŝi ofte babilas kun ili kaj vizitas iliajn hejmojn en dimanĉoj. Iu juna laboristo faris eraron en la granda kultura revolucio. Haŭ Gianhiu vizitis lin en

lia loĝejo kaj helpis lin studi verkojn de Prezidanto Maŭ por solvi sian problemon. La junulo diris kortuŝite: “Mi certe aŭskultos la vortojn de Prezidanto Maŭ en ĉiu ajn okazo.”

Dum la sezono de alta temperaturo, en la ŝpina laborejo regis prema varmego. Kvankam post la Liberiĝo multaj ventolaj kaj malvarmigaj ekipaĵoj estas instalitaj, tamen tio ankoraŭ ne povas kontentigi la postulojn de la disvolviĝo de produktado. Spite al la varmego Haŭ Gianhiu penlaboris kune kun la laboristoj por akiri altan produktoton. Ŝi kaj zorgis ŝpinmaŝinojn kaj bobenis ŝpinitaĵon, kaj de tempo al tempo portis al siaj laboristinoj-fratinoj teon kaj lavtukojn por forviŝi ŝviton. Por plibonigi la laborkondiĉojn, ŝi firme decidis venki la altan temperaturon. De tiam ŝi ofte grimpis sur la tegmenton por ekzameni ĉu la ventolilo funkcias regule aŭ ne; kaj iufoje ŝi enŝoviĝis en la subteran aerkondukilon por esplori kiel forigi la obstaklon en aercirkulado. Ŝi ne nur petis konsilojn de veteranaj laboristoj por reformi la postgintajn malvarmigajn ekipaĵojn sed ankaŭ mem partoprenis en la faka grupo laborante kune kun laboristoj eksterdome. Post tagnokta penado de pli ol ses monatoj, ili fine elfabrikis post provado progresintajn ekipaĵojn kaj per tio multe plibonigis la laborkondiĉojn de la ŝpinejo.

“Ni devas profunde atenti pri la ĉiutaga vivo de la amasoj, de la problemoj de tero kaj laboro ĝis tiuj de brulaĵo, rizo, oleo kaj salo... Ĉiuj ĉi tiuj problemoj koncernantaj la vivon de la amasoj devas trovi sian lokon en nia tagordo.” Gravurinte tiun instruon de Prezidanto Maŭ en sia koro, Haŭ Gianhiu zorgas la vivon de la amasoj en diversaj flankoj. Foje, dum laborado ŝi rimarkis ke iu laboristino fariĝis silentema. Haŭ Gianhiu do interparolis kun ŝi post sia deĵoro kaj informiĝis ke ŝia infano malsaniĝis kaj la farita kuracado ne bone sukcesis. Tiam ankaŭ infano de Haŭ Gianhiu estis en hospitalo pro malsano, tamen pro okupateco ŝi ankoraŭ ne trovis tempon por ĝin vidi. Sed, kiam ŝi informiĝis pri la zorgo de la laboristino, ŝi rapidis frumatene en dimanĉo al hospitalo pli ol 15 kilometrojn fore de sia fabriko por serĉi nepublikan recepton por la infano de la laboristino. Kiam si revenis kun la efika kuracilo, la laboristoj diris: “Haŭ Gianhiu zorgas pri ĉiuj escepte de si mem.”

III

La ŝpinteksejo planis produkti novan specon de dika kaj fortika kotonŝtofo. Iuj tamen ne volis akcepti la taskon opiniante, ke ĝi estas malmulte

profitodona sed multe konsumas materialon, kaj krome ĝi kaŭzos malfacilon en administrado kaj malordon en la laborejo. Ĉar Haŭ Gianhiu ofte partoprenis fizikan laboron, ŝi sciis ke tiu ŝtofo estas tre fortika. Ŝi demandis al la laboristoj de la fabriko, ĉu ili ŝatas tian ŝtofon. Ili ĉiuj respondis per jes. Poste ŝi iris al vilaĝo kun specimeno de tia ŝtofo por kolekti opiniojn de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Kun ŝatego al la specimeno ili diris: “Vi laboristoj plej bone aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj zorgas pri ni kiel eble plej multe!” Tiuj vortoj ekkomprenigis al ŝi, ke produkti tiun ŝtofon aŭ ne koncernas al la problemo “por kiu oni servas”. Studinte la instruon de Prezidanto Maŭ **“La demando ‘por kiu’ estas demando fundamenta, demando principa”**, ŝi komprenis, ke subteni aŭ opozicii la produktadon de tiu ŝtofo signifas batalon inter la du linioj en la ekonomia sfero. Ŝi do aktive organizis la kadrojn, laboristojn kaj teknikistojn por iri al vilaĝoj laŭvice en grupoj por enketi kaj esplori, kaj mobilizis ilin al kritikado de la reviziismaj nigraj tezoj kiel “profito en komando” kaj aliaj kaj tiel altigis la konscion de la laboristoj pri sia devo en produktado de tia ŝtofo ŝatata de laboristaj kaj kamparanaj amasoj.

Dum sia laborado en laborejo, Haŭ Gianhiu vidis ke en amelado granda kvanto da faruno estas konsumita ĉiujare. Ŝi do interkonsiliĝis kun laboristoj por trovi rimedon de farunŝparado. Iu laboristo diris al ŝi, ke antaŭ ŝia alveno al tiu fabriko en 1958 laboristoj jam proponis uzi surogaton en amelado, sed tio ne efektiviĝis pro diversaj malhelpoj. Tiuj vortoj multe inspiris ŝin. Ŝi partoprenis la esploran grupon por uzo de surogato kaj post enketo kaj studo ili decidis uzi anstataŭe algogluon kiu estas flankproduktaĵo de laminariejo. Dum la provado, iuj diris: “De antikveco ĝis nuntempo ja neniu ne uzis amelon por rigidigi ŝpinitaĵon.” Haŭ Gianhiu vidis, ke tia penso estas konservativisma. Ŝi alvokis la laboristojn efektiviĝi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Ŝi persone partoprenis en praktiko kaj provado. Post ripetadaj malvenkoj, ili sukcesis finfine. Kaj dank’ al tio la fabriko povas ŝpari ĉiujare kelkcent mil ĝinojn da faruno por la ŝtato.

Haŭ Gianhiu ĉiam sin tenas kiel ordinara laborulo. Partoprenante la gvidadon de la revolucia komitato de la fabriko, ŝi povas koni la situacion en la produkta praktiko, speguli la opiniojn kaj postulojn de la amasoj kaj efike solvi problemojn en produkto. Tial ŝi estas multe amata kaj subtenata de la laboristaj amasoj.

Malnova Estro de Gisista Grupo

ITUTAGE ni venis en la gisejon de la Dua Ilmaŝina Fabriko de Ŝenjang. En la vasta kaj hela laborejo, streĉe laboris la gisistoj kun ferstangoj en la manoj.

Iu fandforno tiam estis ellasanta ferlikvon. Varmega aero forte blovis al niaj vizaĝoj, bolanta ferlikvo torentis el la aperturo kun disŝprucantaj fajreroj similaj al buntaj artfajraĵoj en festa nokto, kiuj ruĝe lumigis la laborejon. Subite mi rimarkis inter la laboristoj silueton bone konatan, verŝajne tiun de Li Hajting, vicestro de la revolucia komitato de la fabriko. Mi demandis al iu laboristo kaj

tiu ĉi konfirmis mian konjekton. Dum interparolo kun laboristoj, ili rakontis al ni, kiel maljuna Li gvidis ilin en viva studo kaj viva apliko de la filozofia penso de Prezidanto Maŭ.

Post la publikigo de la Komunikado de la Dua Plena Sesio de la Naŭa Centra Komitato de la Partio, tuj levigis en la tuta fabriko nova alta tajdo de viva studo kaj viva apliko de la brila filozofia penso de Prezidanto Maŭ. Kaj la kadroj de diversaj niveloj en la fabriko iris respektive al grupoj en diversaj laborejoj por studi kaj apliki filozofion kune kun la laboristoj. Li Hajting antaŭe estis estro de la



*Li Hajting (dekstre)
faras teknikan renovi-
gon kun laboristoj.*

gisista grupo, kaj nun li laboras kaj studas ĉe la fandforno kune kun la laboristoj, same kiel antaŭe. Kvankam la ofico de maljuna Li ŝanĝiĝis, post kiam li estis elektita kiel vicestro de la revolucia komitato de la fabriko, tamen lia laboremo de la laborista klaso restas sensanĝa kaj li ofte revenas al sia grupo por labori. Tial la laboristoj intime nomas lin, kiel antaŭe, "malnova grupestro". Kaj dum sia laborado, li interkonsiliĝas kun la laboristoj por solvi problemojn en la produktado.

Foje, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ "konstrui nian landon en diligentema kaj ŝparema maniero", laboristoj kuraĝe elmetis la gravan proponon fandi feron per loke produktitaj malgrandaj pecoj de koakso. Ĉu oni povas produkti bonan ferlikvon per tia hejtaĵo? Estiĝis disputo pri tiu demando. Iu diris: "La loke produktita koakso estas en malgrandaj pecoj, tra kiuj aero ne povas facile flui. Tia koakso ne konformas al la teknologia postulo en fandado de fero kaj oni ne povas produkti bonan ferlikvon per tia hejtaĵo." Post aŭskulto de la opinioj de la amaso, maljuna Li diris en kunveno

de la grupo: "La teknologio estas senviva, sed la homoj estas vivaj. Por ĝuste respondi la demandon ĉu oni povas produkti bonan ferlikvon per tia koakso aŭ ne, oni ne devas nur bazi sian opinion sur konkludo en libro, sed devas fari esploron en praktiko!" Kun peco da koakso en la mano, maljuna laboristo Vang Baŭlun diris: "La malgrandeco de la koaksaj pecoj malfavoras al trafluo de aero kaj tia peco ne povas longe bruli. Tio estas malfavoraj kondiĉoj. Tamen, se oni iel renovigos la ventolan ekipaĵon por ke la koaksaj pecoj tute brulu, ĉu oni ne povos tiel estigi la bezonatan temperaturon kaj ŝanĝi la malfavoran kondiĉon en favoran?" Trovinte tiun metodon, Li Hajting ripetade faris eksperimentojn tagnokte kune kun laboristoj kaj fine mastris la leĝojn de brulado de malgrandaj koaksaj pecoj, tiel ke ili produktis unuafoje bonan ferlikvon per tia koakso.

Post tiu sukceso, ili elmetis alian novan proponon, nome uzi ŝtalan kaj feran detranĉaĵon anstataŭ ŝtalpecojn kaj rompaĵojn de malnovaj gisaĵoj kiel materialon por produkto de ferlikvo. Sed

Li Hajting (la unua de dekstre) studas Pri Praktiko kune kun revoluciaj laboristoj de la gisista grupo.



iuj opiniis, ke tio estas maloftaĵo en la mondo. Por korekti ilian malĝustan opinion, maljuna Li zorge kaj lerte edukis ilin, ke ili faru eksperimentojn kune kun la aliaj, kaj por kuraĝigi ilin, li diris: Por la revolucio, ni ja devas iri nian propran vojon de disvolvado de industrio.

Jam estis la dua horo en frua mateno. Tamen Li Hajting kaj la fandformaj laboristoj ankoraŭ atente interkonsiliĝis por ellabori projekton de la eksperimento. Ili rimarkis, ke en uzo de ŝtalaj kaj feraj detranĉaĵoj kiel materialo por produkto de ferlikvo, sin trovas la malavantaĝoj de malrapida konduko de varmo, malalta procento de fandiĝo kaj multeco de malpuraĵo. Por altigi la fandan rapidecon kaj garanti la kvaliton de la ferlikvo, oni devis altigi la temperaturon en la forno. Kiam la ruĝa sundisko leviĝis en la oriento, komenciĝis ilia eksperimento. Antaŭ ĉio ili multe grandigis la procenton de koakso, esperante, ke tiamaniere produktiĝos pli multe da varmo kaj altiĝos la temperaturo de la ferlikvo. Sed la rezulto de la eksperimento montris, ke la temperaturo de la ferlikvo estis malalta kaj la ferlikvo estis subnorma!

Post la malsukceso, ili eksperimentis denove. Ili elĉerpis lecionon el la malsukceso kaj kuraĝe praktikis kun persistemo. Komenciĝis nova eksperimento. Se ĝi sukcesos, ili povos ne nur ŝpari ĉiujare pli ol 3,000 tunojn da ŝtalpecoj kaj rompaĵoj de gisferaj maŝinpecoj de certaj normoj por la ŝtato, sed ankaŭ pretigi kondiĉon por rapidigi ferfandadon kaj tiam efektiviĝos nova impeto en kvalito kaj produktokvanto de ŝtalo kaj fero! Kiel kortuŝa afero! Tuj elfluos ferlikvo! Kelkdek paroj da okuloj fikse rigardis al la aperturo por ellaso de ferlikvo. Iu laboristo paŝis antaŭen, ekpikis la aperturon per ferstango kaj inkandeska ferlikvo tuj brue eltorentis kiel fajra drako kun disŝprucantaj fajreroj brile ruĝigante la laborejon. La ĉeestantoj ĝojkriis nedeteneble: “Kiel bonkvalita kaj rapide produktita ferlikvo!”

Finaŭskultinte la rakonton de la laboristoj, ni vidis ke Li Hajting estis faranta gisadon tenante la direkt-radon de la ferlikvujo. Lia tuta korpo estis ruĝe lumigita de la ferlikvo. Tiam ni ekpensis pretervole: La impeto de la produkto de la gisista grupo rezultiĝis ĝuste el la impeto de homa penso.

Aimuhan

SONG HIN

AIMUHAN estas sekretario de la partia filio de Akja-brigado de Dajoŭdus-komunumo de Hinhe-gubernio de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. En la lastaj dek kelkaj jaroj, kun penemo ŝi vive studis kaj vive aplikis Maŭzedongpenson, brave batalis sur la plejfronto de klasbatalo kaj firme gvidis la malriĉkamparanojn, malsuperajn mezkamparanojn kaj aliajn komunumanojn marŝi antaŭen laŭ la socialisma vojo montrita de Prezidanto Maŭ.

En 1959, la infera vento blovita de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki por restaŭri kapitalismon atingis la ujugurajn vilaĝojn de Hingiang. Aimuhan tuj vidis, ke tiu infera vento celas fiksi produktan kvoton bazite sur familia mastrumado de kampoj kaj dividi la bredatajn brutojn al ĉiu familio. Tia faro retropuŝos milojn kaj milojn da laborantaj popolanoj al la malfeliĉa malnova socio. Aimuhan, kiu multe suferis en la malnova socio, profunde komprenis,



Aimuhan

ke estas la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kiu liberigis ŝin, liberigis la popolon de la tuta lando tiel ke ŝi ĝuas hodiaŭ feliĉan vivon. Rememorente la pasintaĵojn de fondo de interhelpa grupo, kooperativo kaj popola komunumo en respondo al la alvoko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**organiziĝu**”, ŝi organizis malriĉkampanojn kaj malsuperajn mezkampanojn kaj revoluciajn kadrojn por ripetade studi la grandan instruon de Prezidanto Maŭ ke “**nur socialismo povas savi Ĉinion**”. Ŝi diris al ili ĉiuj: “Prezidanto Maŭ alvokas, ke ni organiziĝu kaj iru la brilan larĝan vojon de socialismo kaj komunismo, ni nepre ĝin persiste iru! Ni batalu ĝisfine kontraŭ tiu kiu oponas kontraŭ la vojo de ‘**organiziĝo**’ montrita de Prezidanto Maŭ!” Dank’ al tio iliaj pensoj klariĝis. Gvidate de Aimuhan, la malriĉkampanoj, malsuperaj mezkampanoj kaj aliaj komunumanoj persistas en kolektiva produktado, en kolektiva bredado kaj en la socialisma vojo...

Akja-brigado situas ĉe la piedo de Kiulitakomontaro, sur kiu kreskas nek arbo nek herbo. Sur ĝi troviĝas kelkaj grandaj ventpasejoj kaj sub ĝi etendiĝas sablo-zono kelkdek kilometrojn longa. Kun ventopasejo dorsflanke, Akja-brigado estas ofte atakata de sablovento kaj inundo. Ventego levas sablon kaj rulas ŝtonojn, ŝtopas kanalojn per ili kaj velkigas kaj enterigas plantaĵojn. Furioza

Aimuhan kaj komunumanoj iras al kamplaboro.



ventego eĉ povas rompi arbojn kaj forporti tegmentojn. Nekalkuleble multaj kampoj kulturitaj de popolanoj de Akja estis forglutitaj de flava sablo! Kiam okazis inundo, ĝi ruinigis teron kaj subakvigis plantaĵojn. Dum multaj kaj multaj jaroj, tieaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estis sub minaco de inundo. Antaŭ la malbonaj naturaj kondiĉoj, Aimuhan nek cedis nek ŝanceliĝis, sed gvidis la amasojn en la batalo kontraŭ sablovento kaj inundo. Iujare, kiam tritiko estis ĵus rikoltita, subite plagis montorento, kiu subakvigis la aŭtunajn plantaĵojn, detruis irigaciajn kanalojn kaj ĉirkaŭis domojn. Vadante en akvo Aimuhan iris tra kvar produktaj grupoj, mobilizis amasojn por ŝtopi kaj dreni inundakvon kaj masoni muron por draŝi tritikon. Unu tutan nokton kaj duontagon ŝi pasigis en akvo kaj persistis ĉe la fronto de la batalo de kontraŭinundo. Ĝuste tiam la supera instanco sciigis per sendito, ke ili forlasu Akja kaj transloĝiĝu al Bolikes, kiu estas loko kun pli bonaj kondiĉoj.

Aimuhan firme diris: “Ni ne rajtas forlasi eĉ colon da tero de la patrolando! Kaj krome, Akja ĝuste situas ĉe ventopasejo. Se ni fuĝos kaj

lasos la sabloventon furiozi senbride, kion do povos fari la subaj brigadoj? Ĉu ankaŭ ili translokiĝu post kelkaj jaroj? Por konstrui socialismon, ni devas venki malfacilojn nin apogante sur propraj fortoj kaj peneme lukti en malfaciloj!”

Sub la gvido de Aimuhan, la vastaj amasoj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Akja-brigado lanĉis ofensivon kontraŭ naturaj katastrofoj. Portinte kuirilojn kaj litaĵojn al la kampoj, ili restarigis plantaĵojn, forŝovelis sablon, riparigis irigacian kanalon kaj urĝe semadis. Aimuhan ĉiam aperis tie kie estis plej malfacila kaj laboris tie kie estis plej peniga laboro. Post batalo kontraŭ katastrofo de pli ol dudek tagoj ŝi kune kun komunumanoj savis plantaĵojn, riparigis ĉiujn irigaciajn kanalojn kaj urĝe semis 1,800 muojn da vintra tritiko. Dank’ al tio ili akiris riĉrikolton en aŭtuno.

Por ĝisfunde ŝanĝi la fizionomion de Akja, sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ ke “**sen enketeto ne estas rajto de parolo**”, Aimuhan organizis esploran grupon kiu marŝis al Kiulitake-montaro por esplori la kaŭzon de inundo.

Aimuhan inter komunumanoj



En suda Hingiang la suno ardas kiel fajro en junio. Por Aimuhan, kiu estas febla kaj malsana pro turmentoj de malnova socio, peniga estas ĉiu paŝo kiam ŝi grimpas monton. Iutage kiam ŝi diskutis planon por preventi inundon kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, ŝi subite svene falis kun pala vizaĝo. Rekonsciiginte ŝi tuj stariĝis kvazaŭ nenio okazus al ŝi. Aliaj petis ŝin iom ripozi, tamen ŝi diris: "Mi ne trankviliĝos ĝis morto, se ni ne sukcese bridos la sabloventon kaj inundon!"

Vespere de tiu tago, Aimuhan okazigis kunvenon de kadroj kaj petis reprezentantojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĝin ĉeesti. Post varma diskuto kaj mobilizo en la sama nokto, komunumanoj de ĉiuj produktaj grupoj atingis la konstruejon laŭplane en la sekvinta frumatenon. Aimuhan kaj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj konstruis kontraŭinundan barajon post pena luktado dum duonmonato kaj sukcese baris la inundakvon.

Post tio Aimuhan kaj komunumanoj, kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Daĝaj kiel ekzemplo, faris forstigon por kompletigi sabloventon. Printempe de 1970 ili plantis pli ol dudek mil arbojn kaj aŭtune en la sama jaro ili fosis irigacian kanalon longan je ok kilometroj ĉirkaŭ la monto, kaj plantis vento-rezistan forstan zonon larĝan je kvindek metroj laŭ la kanalo.


Rapide ŝanĝiĝis la fizionomio de Akja-brigado kaj ĉiam pli boniĝas la situacio de revolucio kaj produkto. Post la sukcesoj Aimuhan ne haltis sur la revolucia vojo sed marŝas antaŭen sin tenante modeste, kaj ripetade petas amasojn kritiki ŝiajn mankojn. Aimuhan ofte diris: "La regpotenco estas la vivradiko de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. La decidiga problemo kuŝas en tio, kian linion praktikas la potenctenantoj. Nur oftaj kontrolo kaj helpo al la potenctenantaj kadroj povas garantii, ke ni por ĉiam venke marŝos antaŭen laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ!"

Aimuhan estas en grupa kunveno de la Kongreso de Aktivuloj de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono en Studo de Maŭzedongpenso.



Dediĉo de Sia Juneco al la Popolo

— *Pri avangardaj faroj de la
intelekta junulino Ĝang
Jong en paŝta regiono*



Kamaradino Ĝang Jong

SUBE estas la ŝtala ĵuro de kamaradino Ĝang Jong antaŭ ŝia morto kaj ankaŭ memportreto de ŝia mallonga vivo:

*Por la popolo estu ĉiam mia kara vivo;
Al ĝi dediĉi la junecon ĵuras mi sen drivo.*

Ĝang Jong naskiĝis en laborista familio. Antaŭ la veno al la paŝta regiono ŝi estis konstanta komitatano de la Hehi-a Distrikta Filio de la Kongreso de Mezlernejaj Ruĝaj Gvardianoj en Tiangin kaj diplomito de la 42-a Malsupera Mezlernejo. En aprilo de 1969, responde al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, ŝi venis al Bajjinbaŭlige-a Produkta Grupo de Eerdunvula-komunumo de Hinbaerhuju-flago sur la granda stepo Hulunbej-er por tie partopreni produktan laboron.

La tieaj malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj tre zorgis pri la kreskado de Ĝang Jong. Ili instruis al ŝi paŝtistan profesion kaj lasis ŝin partopreni en arda klasbatalo por ke ŝi spertu hardadon kaj provadon en ĝi. La revolucia spirito, firma starpunkto kaj klara sinteno de la malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj donis al ŝi profundan impreson. Ŝi foje-foje studis la brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ *Analizo de la Klasoj*

en la Ĉina Socio k. a., iris profunde en paŝtistajn jurtojn por fari enketon kaj esploron, analizis kune kun malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj la novan movdirekton de klasbatalo, malkovris la intrigan agadon de la klasaj malamikoj kaj repuŝis ilian atakon. En la arda amasa batalo Ĝang Jong plie altigis sian politikan konscion.

“Por akcepti la reedukon de la malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj, oni devas energie klopodi aktive kaj memkonscie.” Tiel Ĝang Jong agis, kiel ŝi diris. Ŝi modeste lernis bonan penson de la malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj kaj memkonscie trovis sian mankon kompare kun ili. Ŝi ĉiam meminiciate prenis sur sin malpurajn kaj lacigajn laborojn kaj diligente sin hardis. Fari medikamentan banon al ŝafoj estas la plej malpura laboro en la paŝtejo. Ĉar iafoje pro baraktado de la ŝafo, oni falis kun ĝi en banujon plenan de kotakvo. Tamen, Ĝang Jong tion tute neglektis.

En iu somera nokto Ĝang Jong kaj alia intelekta junulino deĵoris por gardi la ŝafojn. Subite blovis furioza vento kaj torentis pluvego kun fulmoj kaj tondroj; la timigita ŝafgrego ekdiskuris. Kvan-

kam ili neniam spertis tiel grandan ŝtormon, tamen spite al tio ili brave postkuris la gregon en la profunda nokto kaj fine revenigis ĉiujn ŝafojn.

Vintro estas la plej malfacila sezono por paŝtistoj. Tamen, Ĝang Jong meminciate prenis sur sin la pezan taskon paŝti 1,600 dujarajn ŝafidojn. Iu diris al ŝi: “Tiuj ŝafidoj nelonge forlasis siajn patrinojn, estas neobeemaj kaj ŝatas kuri; paŝti ilin estas malfacile eĉ por veterana paŝtisto. Ĉu vi povas tion plenumi?” La obstina knabino firme respondis: “Jes!” Iun tagon, ŝi pelis la ŝafidojn al herbejo. Subite ekblovis granda neĝvento kaj la ŝafoj ekkuregis laŭ la direkto de la vento. Ŝi tre maltrankviliĝis pro tio. Sed, kiam ŝi ekmemoris la lukton de malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj kontraŭ la eksterordinara neĝŝtormo en 1966 por protekti la ŝafgregon, kiun rakontis al ŝi iu maljuna malriĉpaŝtisto, ŝi tuj havigis al si neelĉerpeblan forton. Ĝang Jong rapide surĉevaliĝis, postkuris la gregon en la neĝventego pli ol dek liojn kaj sukcese haltigis la gregon, pelante ĝin en valeton por ŝirmi ĝin de atakoj de la neĝvento.

Forpasis la longa frosta vintro, ĉiuj ŝafoj paŝtitaj de Ĝang Jong fariĝis grasaj kaj neniuj el ili estis perdita, tamen sur ŝia vizaĝo aperis vezikoj kaŭzitaĵ de frosteco, el kiuj fluis flava likvaĵo. Sed ŝi tute ne plendis pro tio. La malriĉpaŝtistoj

kaj malsuperaj mezpaŝtistoj laŭdis ŝin kiel “feran knabinon”.

En la praktikado de la tri grandaj revolucioj Ĝang Jong “ne haltis antaŭ malfaciloj, ne klinis sian kapon antaŭ penado kaj ne retiriĝis antaŭ ventoj kaj ondegoj” kaj brave marŝis antaŭen laŭ la granda vojo de sinkombino kun laboruloj.

Sub la zorgo de la Partio kaj edukado de la malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj profunde ŝanĝiĝis la penso kaj sento de Ĝang Jong. Ŝi ekamis la montojn kaj akvojn de la stepo kaj kunligiĝis kun la malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj koro kun koro.

Malsaniĝis iu malriĉpaŝtistino. Informiĝinte pri tio, Ĝang Jong tuj portis sian matracon kaj felton al la malsanulino. Rimarkinte, ke ŝia edzo ne estis hejme, ŝi enloĝiĝis en la jurton de la malsanulino kun sia kolego, zorgeme ŝin flegis kaj faris hejmajn laborojn por ŝi. Kiam vintro estis baldaŭ venonta, malvarmiĝis iom post iom sur la stepo. Pensante, ke la maljuna malriĉpaŝtistino onklino Dajima vivas sola kaj bezonas helpon, Ĝang Jong decidis donaci al ŝi la ŝtofon kaj vaton, kiujn ŝi preparis por si mem. Ŝi venis al la jurto de la onklino kaj diris: “Onklino, prenu tiun ŝtofon kaj vaton kaj faru al vi vatitan veston.” La onklino respondis: “Dank’ al la zorgado de la Partio kaj Prezidanto

Ĝang Jong en paŝtado de ŝafoj



La taglibroj kaj notlibroj de Ĝang Jong



Maŭ, mankas al mi nenio. Vi restas tiel fore de via patrino, reportu ilin por via propra uzo!” Ĝang Jong diris: “Vi ja estas kiel patrino por mi, bonvolu akcepti ilin!” La onklino ne povis rifuzi la donacon pro la insistado de Ĝang Jong. Tamen, la maljunulino domaĝis la ŝtofon kaj metis ĝin bone faldita sub sian kapkusenon. Kaj al ĉiu vizitanto ŝi ĉiam montris ĝin dirante: “Jen la ŝtofo, kiun al mi donis mia filino. En ŝia koro ĉiam estas zorgoj pri malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj!”

Ĝang Jong tranoktis en multaj paŝtistaj jurtoj. En kies jurto ŝi loĝis, ties jurton ŝi prenis kiel sian hejmon: ŝi faris tie ĉiujn hejmajn laborojn, kiaj akvoportado, manĝopreparado, melkado kaj kolekto de bovfekajo. Se iu el malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj havis malfacilon, antaŭ li tuj aperis Ĝang Jong. Ĝang Jong tenis en sia koro malriĉpaŝtistojn kaj malsuperajn mezpaŝtistojn kaj ankaŭ la lastaj tiel rilatis kun ŝi. Foje Ĝang Jong malsaniĝis en la jurto de iu malriĉpaŝtisto. La maljuna mastrino flegis ŝin kiel sian propran filinon, donante al ŝi medikamenton kaj akvon. Karesante ŝiajn harojn, la onklino demandis kunsente: “Estante malsana, ĉu vi ne sopiras al via patrino, kiu estas tiel fore de vi?” Ĝang Jong respondis: “La stepo fariĝis jam mia hejmo kaj la malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj miaj gepatroj!” Aŭdinte tion, la onklino tre emociĝis kaj diris: “Vi ja estas vere bona filino de ni malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj!”

Estis rezulto de nutrado per Maŭzedongpenso, ke Ĝang Jong kreskis kiel junulino de nova generacio sur la stepo el ordinara mezlerneĵano.

Multe ŝanĝiĝis al ŝi la medio, kiam Ĝang Jong venis de la urbo al la paŝtejo, sed ŝia persistemo en viva studo kaj viva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ fariĝis pli forta. Ĉu sur la paŝtejo aŭ sub la olelampo en jurto, ŝi ĉiam diligente studis verkojn de Prezidanto Maŭ utiligante ĉiun troveblan tempon. Dum la 13 monatoj pasigitaj en la paŝta regiono, Ĝang Jong refoje tralegis la 4 volumojn de *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, konstante skribis taglibron kaj faris multajn notojn dum la studo lige kun la praktiko de la tri grandaj revolucioj. En sia taglibro ŝi skribis: “Vere posedu Maŭzedongpenson kun persistemo kaj decidemo kaj fariĝu nepre daŭrigantoj de la revolucia afero de la proletaro.”

En la 3-a de junio de 1970, kiel kutime, Ĝang Jong rajdante sur ĉevalo elpelis la ŝafojn por paŝti ilin ĉe la bordo de Kelulun-rivero. Sur la verda stepo aŭdiĝis de tempo al tempo ŝiaj sonoraj kantoj en la mongola lingvo. Tagmeze ŝi ankoraŭ parolis kun sia kolego pri spertoj en akceptado de reeduko ĉe la paŝtistoj kaj bela estonteco de la stepo... Tamen, ĝuste en la posttagmezo de tiu tago Ĝang Jong oferis sian junan vivon por savi dronantan ŝafon de la produkta grupo kaj per sia heroa faro plenumis sian noblan juron menciitan je la komenco de la artikolo.

Maturiĝo de Iu Mjaŭ-a

Batalanto

EN marto 1969, la mjaŭ-a junulo Long Laŭhua glorie aliĝis al ĈPLA kaj venis servi en iu trupo sub la provinca milita regiono de Hunan. Kiam li venis al la trupo, li ne sciis legi kaj paroli en la han-a lingvo. Tamen, kun firma volo li konkeris la han-an lingvon, serioze kaj persiste studis verkojn de Prezidanto Maŭ kaj rapide kreskis en ĈPLA — granda lernejo de Maŭzedongpenso.

LERNI LEGADON

Foje, la politika direktanto donis lecionon al mjaŭ-aj batalantoj. Instruante, li desegnis bildojn por figure montri la ideon de la vortoj. Instruante la vorton “atenton” li desegnis sur la nigra tabulo soldaton rigide starantan. Por la vorto “saluton”, li desegnis soldaton en saluta pozo. Long Laŭhua pensis en si: jen bona metodo por lerni legadon. Li do petis sian kamaradon skribi por li la vortojn “servu al la popolo” kaj mem aldonis al ili bildojn kaj signojn kompreneblajn nur por li mem. Per helpo de tiu metodo li rapide ellernis tiujn vortojn.

La politika direktanto kortuŝiĝis de lia penemo en lernado kaj kuraĝigis lin per la fablo pri Malsaĝa Avo, kiu transportis montojn. Tiel Long Laŭhua fariĝis pli memfida. Li diris: “Se la Malsaĝa Avo povis forporti du montojn per fosado ŝovelon post ŝovelo, mi certe povos ellerni Maŭzedongpenson klopodante super vortoj unu post alia.” Tiel li lernis la artikolon *Servu al la Popolo* kaj faris pro tio sume 138 desegnojn kaj signojn por sin helpi.

Kiam li ellernis nombron da ofte uzataj vortoj de la han-a lingvo, li notis la renkontitajn malfacilajn

vortojn en aparta kajero por lerni ilin, uzante samsonajn vortojn jam konatajn kiel sonindikilojn.

Por akiri legoscion Long Laŭhua lernis diligente kaj persiste. Ifoje eĉ nur por kompreni unu frazon li ripetade petis helpon de aliaj. Foje li partoprenis raportkunvenon pri komprenajo en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso en Maluĝen de Anhua-gubernio. Post la kunveno grupo da ruĝaj gvardianoj lin ĉirkaŭis volante “lerni de onklo ĈPLA-ano”. Profitante la okazon, li petis ilin instrui al li la vorton “indiferenta”, prezentante la libron *Kontraŭ Liberalismo*, en kiu li trovis ĝin. La amaso laŭdis: “Long Laŭhua estas vere modesta lernanto, kiu volonte lernas de malgrandaj lernantoj.”

Kun ruĝa koro senfine fidela al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj mirinda persisteco, li paŝon post paŝo konkeris la legosciadon en pli ol unu jaro, dum kiu periodo li faris pli ol 700 bildojn kaj signojn, notis pli ol 1,000 malfacilajn novajn vortojn, kaj petis helpojn de ĉiuj kadroj kaj batalantoj de la sama trupo.

UZI ĈEFAN FORTON EN PRAKTIKADO

Foje la partia filio alvokis, ke oni armu sin per Maŭzedongpenso kaj starigu al si la ideon servi ekskluzive kaj senrezerve al la popolo. Long Laŭhua pensis en si, kiel oni povas atingi tion.

Li prezentis tiun demandon al la vicestro de la subplotono, tiu ĉi respondis: “Ekzemple, kiam ni gardostaras, ni devas esti seriozaj sen ia distriĝo aŭ malatento por plej bone plenumi la taskon. Tio estas servi al la popolo ekskluzive kaj senre-

zerve.” Li trovis ke la vicestro diris prave, kaj de tiam li konsciencie gardostaras kun vigla gardemo.

Long Laŭhua sentis ke la enhavo de la du vortoj estas tre riĉa, kaj volis scii, kiel aliaj ilin komprenas. Iutage, kiam li laboris sur legomkampoj, li demandis la mjaŭ-an batalanton Ĝang Nengmaŭ pri lia kompreno pri la du vortoj. Tiu respondis: “Tio signifas ke oni devas fari ĉion ajn ekstreme devkonscie. Ekzemple, ni hodiaŭ plugas la kampon, do ni devas bone tion fari de la komenco ĝis la fino.” Lia respondo plie profundigis la konon de Long Laŭhua. De tiam li ĉiam bone plenumas sian taskon ekstreme devkonscie de la komenco ĝis la fino en ĉiu ajn laboro. Li diris ofte: “Mi ne povas ripozi, ĉar mi ankoraŭ ne plenumis la revoluciajn laborojn ekskluzive kaj senrezerve.” Foje la trupo helpis produktan grupon en najbareco de la kazerno transplanti malfruajn rizidojn. Kiam la laboro estis finita kaj ĉiuj jam lavis siajn manojn kaj krurojn, preparante sin por kolektiĝo, Long Laŭhua trovis ke dekelkaj fasketoj da rizplandidoj nefirme plantitaj flosas sur la akvo. Li pensis, ke por ekskluzive kaj senrezerve servi al la popolo li ne devas lasi eĉ unu fasketon da rizplandidoj neenradikigita, kaj tuj vadis en la kampon por replanti ilin.

Por plie kompreni la vortojn ekskluzive kaj senrezerve, li demandis ankaŭ la estron de la subploto Ĝang Hiufu. Tiu diris: “Farante revoluciajn laborojn, ni ne devas diferencigi laborojn al ni destinitajn kaj nedestinitajn kaj devas aktive fari ankaŭ laborojn nedestinitajn al ni. Ankaŭ tio estas enhavo de la vortoj.” La vortoj de la subplota estro multe lin inspiris, kaj li ekpensis ke por la revolucio li devas multe labori. De tiam, fininte sian propran taskon, li helpis la brediston manĝigi porkojn, lavis legomojn aŭ zorgis fajron por la kuiristoj, riparis produktajn instrumentojn por la trupo kaj faris ĉion renkontitan, tuj kiam li trovas tempon. La kamaradoj laŭdis lin kiel homon ne tolerantan senfaron.

Tamen, post kelkaj tagoj, Long Laŭhua sentis ke la du vortoj indas esti ankoraŭ pli profunde studataj, kaj iris demandi la skribiston Zoŭ Ŝugian. Tiam tiu ĝuste balais la ĉambron kaj respondis: “Ekzemple, por balai ĉambron oni devas purigi ĉiujn kaŝangulojn, sed ne nur la lokojn por ĉiu videblajn, nome ne labori supraĵe sed solide. Ankaŭ tio estas senco de la du vortoj.” Long Laŭhua opiniis liajn vortojn tre profunde signifaj: efektive laborojn revoluciajn oni devas fari solide. Iun sabaton, kiam la kamaradoj ripozis



Long Laŭhua en laboro

post la vespermanĝo, Long Laŭhua ankoraŭ distranĉis porkherbon. En tiu tago estis kolektita multego da herbo. Timante ke eble li ne povos fini la laboron antaŭ nokta mallumiĝo, li rapidigis la tranĉadon. Poste kiam li trovis ke la tranĉaĵoj estas iom tro longaj, li apartigis tiujn tranĉaĵojn kaj ilin distranĉis refoje.

Ĉu tiel agante, li jam atingis tion, ke li servis al la popolo ekskluzive kaj senrezerve? Pri tio li demandis la eskadronestron. Tiu respondis en ligo kun la aktualaj pensoj de iuj batalantoj: “En revolucio oni ne devas dividi sian koron, sed labori tutkore. Kun individuaj konsideroj oni ne povas servi al la popolo ekskluzive kaj senrezerve.” Tiujn vortojn Long Laŭhua ripetade pripensis por profunde ilin kompreni.

Iunokte li skribis la du vortojn en sia notlibro kaj meditadis. Jen venis la politika direktanto.



Long Laŭhua (maldekstre) studas Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong kune kun sia kunbatalanto.

Long Laŭhua do diris al li: “Pri la du vortoj ekskluzive kaj senrezerve, mi demandis al multaj personoj kaj maĉadis preskaŭ du monatojn, tamen, mi ne estas certa ke mi jam plene ilin komprenis. Bonvolu ankoraŭfoje klarigi al mi, kiel oni devas agi por servi al la popolo ekskluzive kaj senrezerve.” La direktanto respondis: “Tio signifas tutkore kaj plenanime servi al la ĉina popolo kaj al la popoloj de la tuta mondo, faligi imperiismon, reviziismon kaj la reakciulojn kaj realigi komunismon.” La respondo kvazaŭ malfermis pordon al la koro de Long Laŭhua. Li ĝoje diris: “Nun mi komprenas: ekskluzive signifas tute ne konsideri pri si mem kaj dediĉi la tutan koron al la revolucio; kaj senrezerve signifas komplete neniigi la sistemon de ekspluato de homo al homo sur la terĝlobo kaj realigi komunismon per firma unuiĝo kaj komuna klopodo kun la revoluciaj popoloj de la tuta mondo.” De tiam li pli energie klopodas vive studi kaj vive apliki Maŭzedongpenson.

NOVA STARTPUNKTO

Kiel bambuido rapide kreskadis sub la printempa suno, Long Laŭhua progresis de tago al tago sub nutrado de Maŭzedongpenso.

En aŭgusto, kiam ankoraŭ ne pasis duonjaro depost lia rekrutiĝo, venis al lia kapo bela deziro: nepre fariĝi progresema elemento de la proletaro.

Iutage, li sidis sola en la dormoĉambro kaj elprenis verdigran kupran moneron el sia monujo, je tio li pretervole rememoris mizeron de mjaŭ-oj en la malnova socio kaj ekpensis ke la klasa malamiko ankoraŭ ne akceptis sian malvenkon.

Antaŭ la rekrutiĝo, Long Laŭhua estis milicano de sia komunumo kun kvin bonoj. Eĉ post ricevo de la avizo por rekrutiĝo, li ankoraŭ aktive partoprenis batalon kontraŭ klasa malamiko. Kune kun aliaj milicanoj li batalis kontraŭ reakcia bienulo kaj el ties domo trovis du bajonetojn, unu sabron, tri kartoĉojn kaj grandan poton da kupraj moneroj. Tiuj moneroj ja estas solida atesto pri tio ke la bienula

klaso ekspluatis la malriĉkamaranojn kaj mal-superajn mezkamaranojn; la armiloj estas krima atesto pri tio ke la klasaj malamikoj intencas restaŭron. Estas tiu bienulo, kiu devigis la patron de Long Laŭhua laboregi por li kiel jardungiton ekde la aĝo 14-jara kaj multe turmentis lian patron. En kompleto kun banditoj la bienulo forbruligis lian solan kabanon kaj forrabis ilian grenon. Post la Liberiĝo, Long Laŭhua kaj liaj familianoj ekhavis feliĉan vivon. Por ĉiam firme teni en memero la klasan suferon, neniam forgesi la klasan batalon kaj ĉiam revolucii strikte sekvante Prezidanton Maŭ, en la tago de sia soldatiĝo li petis de la produktita brigado kupran moneron por portadi ĝin kiel instrumenton de klasa eduko al si mem.

Tiun vesperon, li rakontis al la politika direktanto sian deziron de partianiĝo. Li diris al la lasta: “Prezidanto Maŭ estas la savanto de ni mjaŭ-oj, la hodiaŭa feliĉo de nia nacimalplimulto

estas donita de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio. Nia partio estas granda, glora kaj ĝusta. Maŭzedongpenso ja estas por ni luma vojlampo de daŭra revoluciado. Mi deziras fariĝi partiano por ke mi sekvu Prezidanton Maŭ por revolucii, faligi imperiismon, reviziismon kaj la reakciulojn, neniigi la sistemon de ekspluato de homo al homo sur la terglobo kaj realigi komunismon sub kulturo kaj eduko de la Partio.” Nemultaj estis liaj vortoj sed ili klare esprimis lian noblan idealon.

La signalfajfo por lampestingo jam sonis. Long Laŭhua venis en la lernoĉambron kaj tie sidis sola. Li komparis la hodiaŭon kun la pasinteco

kaj lia koro tre malkvietiĝis. Ho, la bono donita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ estas pli alta ol la ĉielo kaj pli profunda ol la maro. Li malfermis sian notlibron kaj serioze skribis la vortojn “komunista partio”, kaj kun larmoj en la okuloj li desegnis sian noblan idealon sub la vorto “partio”: Unu revolucia batalanto kun levita dekstra brako juras al la Partio ke li ĉiam estos fidela al Prezidanto Maŭ kaj la Partio.

Je la 29-a de marto, 1970 — antaŭ la datreveno de la venka malfermo de la 9-a Kongreso de la Partio, la peto de Long Laŭhua por partianiĝo estis sankciita.



Enciklopedieto

Mjaŭ-nacio

MJAŬ-NACIO estas unu el la nacimalplimulto de nia lando. Ĝia lingvo apartenas al la mjaŭ-jaŭ-a subfamilio de la hantibeta familio. Pli ol duono de ĝiaj nacioj loĝas en la provinco Gujĝoŭ, sudokcidente de nia lando. La ceteraj dise loĝas en la provincoj Hunan, Junnan, Siĉuan, Guangdong, Hubej kaj la Guanghi-a Ĝŭang-nacia Aŭtonoma Regiono, sude kaj sudokcidente de nia lando.

La lokoj kie loĝas mjaŭ-nacianoj plejparte estas altaj kaj malvarmaj montregionoj. La mjaŭ-nacianoj ĉefe okupas sin pri agrikulturo kaj samtempe ankaŭ kulturale aleŭritojn, tearbojn k. a. La virinoj de mjaŭ-nacio estas lertaj en brodado kaj vakstinkturado de teksaĵo. Iliaj vestaĵoj estas ornamitaj ofte per brodaĵo kaj havas sian apartan karakteron. Riĉaj estas iliaj popolaj artoj. Ili ludas *luŝeng* kaj *suona* kaj aliajn muzikinstrumentojn. La mjaŭ-nacianoj plej ŝatas la dancon akompanatan per *luŝeng*. Ĝia mjaŭ-dramo similas al la teatro de hannacio, sed ĝia dialogo kaj vestaĵoj havas okulfrapan nacian karakteron.

Antaŭ la Liberiĝo, komplotante unuj kun aliaj, imperiistoj kaj enlandaj reakciuloj praktikis politikon de nacia subpremo, tiel ke la mjaŭ-naciaj popolanoj ne nur ne havis ajnan rajton, sed ankaŭ suferis kruelan persekutadon. En la longa malfacila tempo antaŭ la Liberiĝo, kune kun la aliaj nacioj de nia lando, la mjaŭ-a popolo faris kontraŭimperiisman kaj kontraŭfeŭdisman batalon. Post la Liberiĝo, sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, same kiel la aliaj nacioj de nia lando, la mjaŭ-a popolo fariĝis mastro de la ŝtato kaj ĝuas rajton de nacia egaleco. Pli kaj pli multaj mjaŭ-nacianoj partoprenis en gvida laboro de la diversnivela registaro kaj iuj plenumas gravan oficon. Multaj mjaŭ-aj kadroj kreskas senĉese en la batalo. Nun en la subprovincoj, gubernioj kaj vilaĝoj, kie amase loĝas mjaŭ-nacianoj, oni jam efektive aŭtonomecon kaj en la subprovincoj, gubernioj kaj vilaĝoj, kie mikse loĝas mjaŭ-nacianoj kaj aliaj nacioj, oni efektive kune aŭtonomecon. Krome,

tiuj lokoj jam praktikis demokratian reformon kaj socialisman transformon, renversis la feŭdajn ekspluatajn sistemojn kaj efektive populkomunumigon.

Dank' al la prizorgo de la Partio kaj la registaro, la mjaŭ-nacia popolo kreis sian propran fonetisman skribsistemon el latinaj literoj, establis lernejojn, iom post iom ĝeneraligis klerigadon, kaj pli kaj pli riĉiĝas ilia kultura vivo kaj ĝenerale pliboniĝas la higiena stato. Rilate al agrikulturo, la mjaŭ-a popolo energie konstruas irigacian sistemon, entreprenas forstumadon, aktive disvastigas progresajn agrikulturajn teknikojn kaj la produkto fluge disvolviĝas. La industrioj kreskis de nulo kaj akiris grandan sukceson.

Ekde la komenco de la Granda Proletara Kultura Revolucio, Maŭzedongpenso multe disvastiĝas en la montvilaĝoj de mjaŭ-aj popolanoj kaj aperis multaj laŭdindaj homoj kaj laŭdindaj aferoj. La mjaŭ-a popolo rompis malnovajn morojn kaj starigis novajn kaj nun venke marŝas antaŭen sur la socialisma vojo kune kun la aliaj nacioj de la Patrio.

Reflugado en la Ĉielo

CONG FEJ

EN la lazura firmamento brilas la suno. Sur iu aerodromo de la aera armeo de nia lando en la sudo, oni fiksas sian rigardon al la ĉielo kaj vidis ke arĝenta supersona batala jeto jen plongas, jen ruliĝas, kvazaŭ aglo libere fluganta en la aero. La rigardantoj ne povis kredi, ke la aviadisto de tiu ĉi jeto estis iam serioze vundita.

La aviadisto estas Ŝang Ŝiji, vicestro de eskadro de iu trupo de la aera armeo de nia lando. En la pasinteco, li protektis sian kunbatalanton en kriza momento, riskante sian vivon; li iam apombe kaj kuraĝe savis sian aviadilon el kriza perturbo kaj venke reflugis al aerodromo; en vintro de 1967, por protekti la vivon kaj posedaĵon de popolanoj, li estis serioze vundita — li ricevis kvar ostorompojn je ambaŭ gamboj kaj la maldekstra brako.

“Ĉu mi povos reflugi en la lazura ĉielo per jeto kun rompita gambo kaj brako?” Li multe pensadis kaj multe pensadis kuŝante en lito. Li rememoris la malfeliĉan historion de sia familio en la malnova socio kaj en lia brusto flamis la klasa kaj nacia malamo. Rememorante sian kreskadon de malriĉa knabo kolektanta karborestaĵojn en la popolan aviadiston sub la edukado de la Partio kaj Prezidanto Maŭ post la Liberiĝo, li ne povis reteni sian ekscitiĝon. Pensante pri la Granda Proletara Kultura Revolucio arde flamanta tra la tuta patrolando kaj pri la glora tasko de la Popola Liberiga Armeo, ... li neniel povis endormiĝi. Li petis alian malfirmi al li *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj serioze studis la instruon “**La Popola Liberiga Armeo ĉiam estas batalanta trupo**”. Ju pli li studis, des pli grandiĝis lia energio kaj firmiĝis lia batalvolo. Li faris decidon en si: “Venki la vundojn, poste reflugi en la ĉielo por daŭre batali por defendi la sanktan teritorian aeron de la granda

socialisma patrolando kaj defendi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ.”

La firma decido de Ŝang Ŝiji reflugi en la ĉielo profunde emociis kuracistojn. Por ke Ŝang Ŝiji resaniĝu kaj povu daŭre stiri aviadilon, gvidantoj de la hospitalo okazigis specialan kunvenon kaj decidis fari al li operacion de interna fikso post ripetada interkonsiliĝo.

Por fari operacion de interna fikso, estas necese distranĉi la gambon, enbati en la ostojn ŝtalajn stangojn kun diametro de 1 centimetro kaj longeco de 40 centimetroj por kunigi la du partojn de la rompita ostoj. Antaŭ la operacio, Ŝang Ŝiji diris al la kuracistoj kun rideto: “La operacion faru kuraĝe, mi nepre kunagos bone kun vi ĝis la fino!”

Dum la operacio Ŝang Ŝiji kun granda forto retenis la akran doloron. Kuracistoj admiris lian firman volon kaj laŭde nomis lin “ŝtala batalanto edukita per Maŭzedongpensio”.

Dank’ al zorga kuraco kaj flegado, Ŝang Ŝiji akiris la unuan venkon en la batalo kontraŭ vundo. Post tri monatoj finiĝis la kuraca periodo kaj Ŝang Ŝiji alfrontis la periodon por restarigi funkcion de artikoj.

Post fiksiĝo de tri monatoj, lia maldekstra brako formis angulon je 50 gradoj kaj komence li nur povis movi la antaŭbrakon je kelkaj gradoj. Por restarigi la funkcion de artikoj de la maldekstra brako, li forte turnis eksteren kaj premis malsupren la maldekstran antaŭbrakon per la dekstra mano. Kiam li ne havis sufiĉan forton por tion fari, li petis helpon de kuracistoj kaj persistis en tio ĝis kiam ŝvito gutis de sur la frunto. Post 20 tagoj lia maldekstra brako jam povis plene rektiĝi, fleksiĝi kaj turniĝi internen kaj eksteren.

Pro longtempa gipsa fiksado, liaj ambaŭ gamboj ne povis fleksiĝi nek moviĝi. Por restarigi la funkcion de la artikoj, li levadis sablosakojn, movadis la gambojn kaj sin ekzercis per aliaj metodoj ĝis kiam li tute laciĝis. Post 8 tagoj liaj ambaŭ gamboj jam povis fleksiĝi je 50 gradoj kaj post 25 tagoj je 90 gradoj.

Ŝang Ŝiji povis ellitiĝi. Kiam li faris la unuan paŝon kun granda peno, ekbolis la malsanula ĉambro.

Je la sekvinta tago post la ellitiĝo, li komencis senĉesan ekzercon de irado. Komence li iris sin apogante sur muro kaj post kelkaj tagoj li jam iris per du lambastonoj. Post kelkaj tagoj li unue demetis la maldekstran lambastonon kaj poste la alian. Forpasis unu kaj duona monatoj, li jam povis laŭvole iri sen ajna helpo. Post 85 tagoj plenaj de peniga ekzercado Ŝang Ŝiji jam tute restarigis la funkcion de la gamboj. Post ekzameno estis konstatite, ke li povas stiri aeroplanon. La kuracistoj diris kun emociiĝo: “Kamarado Ŝang Ŝiji, gratulon al vi, realiĝis via deziro!”

En marto de 1969 li revenis al sia trupo. Por reakiri pli bone la sanon, li diligente vive studis kaj vive aplikis Maŭzedongpenson, disvolvis la spiriton de senhezita antaŭenmarŝo kaj persistis ĉiutage en kurado, longdistanca militirado, levadis halterojn, kaj ofte faris montgrimpadon, naĝadon, bicikladon kaj produktan laboron.

Post kiam li tute reakiris la sanon, li daŭre studis flugan teknikon sub la direktado de Maŭzedongpenso. Je la 16-a de julio de 1969, la ĉielo estis hela. Emociiĝo vidiĝis sur la sunbruna vizaĝo de Ŝang Ŝiji. Akompanate de rigardo de aliaj, li ensaltis en superonan batalan jeton. En palpebrumo ekbruegis la motoro kaj la jeto rekte flugis en la lazuran firmamenton. La aerodromo kvazaŭ fariĝis bolanta maro kaj longe daŭris la huraoj “Vivu Prezidanto Maŭ”.

Realiĝis la ŝtala decido de Ŝang Ŝiji! Post nelonge li partoprenis flugan ekzamenon. Li longe ne povis kvietigi sian ekscitiĝon, pensante ke estas la granda Maŭzedongpenso kiu redonis al li ŝtalajn flugilojn. La ekzameno estis tre rigora: li devis fari specialajn flugteknikojn per unuopa aeroplano. Li kuraĝe, aplombe, absorbite kaj lerte stiris la batalan aglon kaj sukcese trapasis la ekzamenon.

Nun, kune kun siaj kunbatalantoj, Ŝang Ŝiji tagnokte patrolas en la sankta teritoria aero por defendi la grandan socialisman patrolandon.



GRANDA SINKRONA ELEKTRA MOTORO DE ALTERNA KURENTO

La Dua Termoelektra Fabriko de Baŭtoŭ de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kaj aliaj 7 fabrikoj faris 6,300-kilovatan grandan sinkronan elektran motoron de alterna kurento, la ŝlosilan parton de granda oksigenprodukta maŝino.

En la komenco de la prova fabrikado, la 8 fabrikoj jam renkontis malfacilojn de manko de materialo, ekipaĵoj kaj teknikoj. Sed la laboristoj de la fabrikoj kuraĝis pensi kaj kuraĝis agi, kaj fine venkis la malfacilojn unun post alia. Ekzemple, por prilaboro de granda rotora ŝafto—ŝlosila parto de granda elektra motoro—oni bezonas grandan hidraŭlikan premaŝinon, sed tiuj fabrikoj ne havas tian grandan ekipaĵon, la laboristoj elpensis novan metodon kaj elforgis per malgrandaj ekipaĵoj la rotoran ŝafton kun pezo de preskaŭ 8 tunoj.

Prova funkciigo montris, ke la motoro tute konformas al la difinita normo de kvalito, kaj per tio oni faris kontribuon al la disvolviĝo de la fera kaj ŝtala industrio de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.

NOVTIPA TUBA DRILTURO

La Fabriko de Minprospektoraj Maŝinoj de la urbo Ĝanggiakoŭ de la provinco Hebej lastatempe sukcesis fabriki novtipan tuban 23-metran drilturon de avangarda nivelo, kaj faris per tio kontribuon al la afero de geologia esplorado de nia lando.

Tia drilturo estas malpli peza ol la malnova 22-metra drilturo. Ĝi estas facile kunligebla kaj transportebla kaj ĝia muntado estas simpla kaj sekura.

La novtipa drilturo estas kreita per kolektiva saĝo kaj la metodo de “triflanka kombiniĝo” de projektantoj, uzantoj kaj fabrikantoj.

Verkoj de Maŭ Zedong

(En Esperanto)

(Parto de la Verkoj post Jaro 1949)

- Pri la Problemo de Agrikultura Kooperigo 52 pĝ.
- Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo 68
- Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro 32
- De Kie Venas la Korektaj Ideoj de la Homo? 8
- Unuiĝu la Popoloj de la Tuta Mondo por Frakasi la Usonajn Agresantojn kaj Ĉiujn Iliajn Lakeojn
—Deklaroj kaj paroloj por subteni la usonajn nigrulojn, la popolojn de suda Vjetnamio, Panamo, Japanio, Kongolando (L.) kaj Dominiko en iliaj justaj bataloj kontraŭ la usona imperiismo 28
- Deklaro de Kamarado Maŭ Zedong, Prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, por Subteni la Batalon de la Usonaj Nigruloj kontraŭ Perforta Subpremo (16 aprilo 1968) 8
- Popoloj de la Tuta Mondo, Unuiĝu kaj Venku la Usonajn Agresantojn kaj Ĉiujn Iliajn Lakeojn! (Deklaro je la 20-a de majo 1970) 12
- Eldonitaj de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio
Distribuas la Libro servo de Ĉina Esperanto-Ligo,
Pekino, Ĉinio
- Aĉetu ilin ĉe lokaj perantoj aŭ rekte ĉe la Libro servo de Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Letero de K-do

Nguyen Van Kinh

al Ĉina Esperanto-Ligo

La 15-an de marto 1971

Al la Estraro de ĈINA ESPERANTO-LIGO en Pekino

Tre estimataj kaj karaj kamaradoj,

Ĉe la jaro 1971 — tiu de la 15-a jubileo de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, kiu fondiĝis la 9-an de decembro 1956 en Hanojo, sub la nova reĝimo de Vjetnama Demokratia Respubliko — permesu min, en la nomo de ĉiuj vjetnamaj geesperantistoj, esprimi al vi kaj al ĉiuj niaj ĉinaj gesamideanoj la plej profundajn dankojn pro viaj ĝisnunaj subteno kaj helpo, kiuj multe kuraĝigis nin en niaj aktivecoj kontribuantaj al la nacisava batalo de nia vjetnama popolo kontraŭ la usonaj agresantoj, al la defendo de la socialisma tendaro kaj de la monda paco.

Ĉina Esperanto-Ligo dum la dek-kvin pasintaj jaroj ĉiam staris ŝultre ĉe ŝultro kun ni en la kontraŭimperiismaj vicoj kaj ĝi ne malavaris helpi nin per diversaj agoj, speciale per la aperigo de aktualaj artikoloj en EL POPOLA ĈINIO kaj programoj de la PEKINA RADIO, krome per la eldono de altavaloraj libroj kaj albumoj celantaj diskonigi tra la esperantista mondo la veran situacion de nia nacisava batalo. Tial, ni plene kredas, ke dum la usona imperiismo intensigas kaj vastigas sian agres-

militon tra la tuta Hinduĉinio, niaj ĉinaj gesamideanoj grupiĝintaj en Ĉina Esperanto-Ligo ankoraŭ pli streĉos siajn batalvicojn ĉe la flanko de la frataj vjetnamaj esperantistoj. La lasta amikeca vizito al nia lando fare de la delegacio de la Ĉina Komunista Partio kaj de la Registaro de Ĉina Popola Respubliko estrita de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, pli-fortigis kaj disvolvis la batalan unuiĝon inter ambaŭ niaj popoloj fronte al la aventurismaj usonaj imperiistoj, kaj tio nepre kontribuos akceli la amikajn rilatojn inter la vjetnama kaj ĉina esperantistaroj.

Permesu nin ankoraŭ tiuokaze sendi al vi niajn varmajn gratulojn pro viaj senlacaj kaj sindonemaj laboroj, kiuj faris Ĉinan Esperanto-Ligon ĉiam inda je ties revolucia tradicio, jam kronita de la favoro kaj de la famkonata instruo de Prezidanto Maŭ Zedong, la granda gvidanto de la frata ĉina popolo kaj la granda amiko de nia vjetnama popolo: **“Mi dirus ankoraŭ la samon: Se oni prenas Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internaciisman kaj la ideon vere revolucionan, do Esperanto povas esti lernata kaj devas esti lernata.”**

Kun tiaj dankesprimoj kaj estimo, ni havas la honoron sendi al vi jenajn memoraĵojn modestajn de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio:

Unu flagon.

Unu paron da florvazoj faritaj el usonaj kanonkartoĉoj.

Kun la espero, ke senĉese kresku niaj amikecaj kontaktoj kaj kunlaboroj, ni elkore deziras al vi, tre estimataj kaj karaj kamaradoj, bonan farton kaj multpliajn sukcesojn en viaj noblaj laboroj.

Vivu la frata amikeco kaj batalanta unuiĝo inter la vjetnama kaj ĉina popoloj!

Vivu Prezidanto Maŭ Zedong, altestimata gvidanto de la frata ĉina popolo!

Certe fiaskos la usona imperiismo!

Certe triumfos la popoloj de Vjetnamio, Laolando, Kampuĉio!

Esperanto servu la proletaran internaciismon!

La Prezidanto de

Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio

NGUYEN VAN KINH



Elementaj Lernejanoj Mastrumas Terkulturejon

PROFUNDE disvolviĝas la eduka revolucio en nia lando kaj novaj aferoj senĉese aperas sur tiu fronto. Per siaj propraj fortoj, la instruistoj kaj lernantoj de iu elementa lernejo en montregiono de Gilin-provinco en la Nordoriento starigis malgrandan terkulturejon por fari produktajn laborojn, sciencajn eksperimentojn kaj superregi la naturon, kaj atingis ĝojindajn rezultojn. Tio estas unu el multaj ekzemploj.

MAIZO EL DAĜAJ TROVIS NOVAN HEJMON SUB ĈANGBAJ-MONTARO

La instruistoj kaj lernantoj de Ĉongŝan-a Elementa Lernejo de Ĉongŝan-komunumo, Helong-gubernio de la Janbian-a Korea Aŭtonoma Sub-provinco, Gilin-provinco, decideme prenis Daĝaj kiel modelon por bone funkciigi sian malgrandan terkulturejon. Ili skribis pri sia intenco al kamarado Ĉen Jongguj, la sekretario de la partia filio de Daĝaj-brigado, kaj ricevis de la lasta grandan kuraĝigon kaj pakon da maizosemo, kaj plie proponon doni al la terkulturejo nomon "Pioniro".

Tre ĝojis la instruistoj kaj lernantoj pro la ricevita respondo. Ili unuspire fospretigis 30 muojn (—du hektarojn) da ŝtuparkampoj kaj semis la maizon el Daĝaj en parto de la novaj kampoj.

Hejmigi la maizon el Daĝaj en la areo de Ĉangbaj-montaro ne estis afero facila, ĉar ĉi-loke la senprujna periodo daŭras nur 120 tagojn, dum la maizo bezonas 140 tagojn por maturiĝo, kun diferenco de 20 tagoj. Sub la helpo de instruistoj, la lernantoj aplikis la sciojn akiritajn en klasĉambroj sur la kampoj: planti loke kulturatan maizon de frua maturiĝo, kies kreskado bezonas nur 100 tagojn, mikse kun la maizo el Daĝaj por ŝanĝi la karakteron de la lasta per interkrucigo.

Tamen, baldaŭ aperis demando, ĉar la du specoj de maizo kreskas malsame, unu alte kaj la alia malalte. Tio alportis malfacilon en fekundigo. La instruistoj kaj lernantoj cerbumis por trovi rimedon. Ili zorgeme faris surkampa flegadon kaj solvis la problemon per artefarita fekundigo.

La rezulto estis tre kontentiga. Dank' al interkruciĝo ili ricevis novan specon taŭgan por loka kulturado. Kaj ĝia pomua produktokvanto estas pli alta je pli ol 100% kompare kun la loka speco. Tiu speco de maizo tuj estis vastigita en la tuta komunumo.

SUKCESO EN PROVOKTURADO DE LAGENARIO

La komunumanoj de Ĉongŝan kutimas uzi lagenarian frukton kiel ĉerpilon, sed ilia loko ne produktas tiajn fruktojn taŭge grandajn. De multaj jaroj oni provokturis lagenarion, tamen ne sukcesis: aŭ ĝi ne fruktis aŭ donis nur malgrandajn fruktojn tute ne taŭgajn por kontentigi la bezonojn. Tial ĉiujare la komerca fako devis enporti tiujn ĉerpilojn de aliaj lokoj.

La ruĝaj gvardianoj de Ĉongŝan-a Elementa Lernejo organizis lagenarian grupon por fari sciencajn eksperimentojn kun la celo kontentigi la bezonojn de la malriĉkampaĵoj kaj malsuperaj mezkampaĵoj.

Membro de la nomita grupo Piaŭ Hiuĵi serioze studis la brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ la "tri popularajn artikolojn" kaj esprimis firme ke li tutkore kaj tutanime servos al la popolo kaj strebados ĉiam al pli bona plenumo de la sciencaj eksperimentoj. Kiam la lagenarioj ĝermis el la tero, li sarkis kaj akvumis la grundon kune kun la grupanoj, sub la helpo de instruistoj. Kiam ŝanĝiĝis la vetero, li iris al la kampoj por pririgardi kaj fari necesajn flegadojn.

Kiam ekfloris la plantoj, ĉiutage en frua mateno kaj post lernohoroj, li venis al la plantoj por detale observi ilian kreskadon kaj floradon. Li trovis ke la floroj malfermas sin vespere kaj tuj refermas sin matene, kiam leviĝas la suno. Memorante la lecionon pri fekundigo de inaj floroj, kiun donis la instruisto, li plie observis la kondiĉojn de fekundigo de la plantoj. Ordinare la periloj de transdono de polenoj estas insektoj kaj vento. Sed ĉi tie la temperaturo estas malalta dum mateno kaj vespero, dum kiuj abeloj kaj papilioj ne montras

sin inter la plantoj. Cetere, kiam la lagenarioj floras, estas ĝuste la tempo de apero de rosoj. La poleno malsekigita malfaciligas la transportadon de vento. Do la ŝanco de fekundigo estas tre malofta.

Piaŭ Hiuji analizis kune kun instruisto la karakterojn de lagenario kaj la lokaj klimataj kondiĉoj, ligis la sciojn el libroj kun konstataĵoj en praktiko kaj konkludis ke oni devas fari artan fekundigon por plimultigi fruktojn de la lagenarioj kaj ŝanĝi la malbonajn fekundigajn kondiĉojn kiuj kaŭzis malmultan fruktiĝon en la pasinteco.

Post la malkovro de la sekreto, la ruĝaj gvardianoj ĉiutage frue leviĝis por fari artefaritan fekundigon antaŭ ol fermo de la floroj de lagenarioj. Dank' al ilia persista klopodado la lagenarioj en la eksperimenta kampo ĉiu portas meznombre kvin fruktojn kun normala grandeco.



Agronometo

VEJ Tuanmin estas ruĝ-gvardiano en la vilaĝo Gonggiaĝuang de Ĝouĝi-gubernio en Ŝenhi-provinco. La komunumanoj ĉiam ŝatas nomi lin "agronometo" kiam ili vidas lin. Ĉar li kaj liaj kunlernantoj elkulturis bonan specion de tritiko "Tianza n-ro 2".

Iun matenon antaŭ du jaroj Vej Tuanmin viglec-plene venis al onklo Vej, reprezentanto de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por mastrumado de la lernejo kaj diris: "Prezidanto Maŭ instruas al ni: **'Kun lernado kiel sia ĉefa tasko, lernantoj devas samtempe lerni ankaŭ aliajn aferojn, tio estas, aldone al siaj lernejoj studoj, ili devas lerni ankaŭ industriajn, agrikulturajn kaj militajn aferojn. Ili devas ankaŭ**

ELLERNI KONJEKTADON DE VETERO

Ĉongŝan-komunumo situas alte en montregiono kun temperaturo malalta kaj vetero ŝanĝiĝema kaj ofte estas atakata de printempa frostoj, aŭtuna prujno, pluvegoj kaj montotorentoj.

La instruistoj kaj lernantoj decidis kontroli la atmosferan staton. Ili starigis malgrandan meteorologian stacion sinapogante sur propraj fortoj kaj iris lerni humile de multaj observatorioj, meteorologiaj stacioj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiuj estas spertaj pri konjektado de vetero. Kuraĝaj en praktiko ili iom post iom ellernis konjektadon de vetero kaj veterinformadon. En la lastaj jaroj, ili akumulis grandan kvanton da materialo kaj ĝenerale ekkonis la leĝojn de atmosfera ŝanĝiĝado de la loko, dank' al ripetada enketo, esplorado kaj analizo, tiel ke ili povis konjekti kaj antaŭdiri pli ĝuste la veteron kaj faris kontribuon en loka terkultura produkto.

kritiki la burĝaron.' Mi volas lerni agrikulturon kaj fari eksperimenton pri bona specio de tritiko, ĉu bone?" Onklo Vej tre aprobis lian ideon kaj kuraĝigis lin agi laŭ instruoj de Prezidanto Maŭ.

Vej Tuanmin tuj organizis kune kun siaj kunlernantoj agrikulturaran grupon. Sed por agrikulturado mankis al ili iloj, eksperimenta kampo kaj semoj, kaj krome tiam ne estis sezono por semado. Kion fari? Ili studis la instruon de Prezidanto Maŭ "**peneme lukti en malfaciloj**" kaj decidis prunte-preni agrikulturilojn kaj fari eksperimentojn pri semselektado kaj hibridigo unue en kampo de la produkta brigado. La brigado tute subtenis ilin, kaj komunumanoj afable konigis al ili karakterojn de diversaj specioj de tritiko.

Ja estas peniga afero iri al ĉiuj tritikaj kampoj por serĉi kaj observi bonajn tritikojn kaj elkulturi el ili pli bonan specion. Tamen, timante nek penadon nek laciĝon Vej Tuanmin frekventadis kun siaj kunlernantoj tritikajn kampojn en diversaj lokoj.

En la unua jaro, ili iris al tritikaj kampoj de pluraj komunumoj, elektis 6 ekster-ordinarajn tritikajn plantojn por eksperimentado kaj krome trovis 34 bonajn speciojn.

En la dua jaro, Vej Tuanmin kreis kun siaj kunlernantoj malgrandan eksperimentan kampon ĉe rivera bordo forportinte sablon kaj ŝtonojn kaj semis sur ĝi la bonan specion kulturitan de ili mem.

Kiam la tritiko kreskis ĝis ilia ŝultro kaj venis la tempo por artefarita fekundigo, ili streĉe laboradis sur la kampo kaj samtempe petis ofte instruon de la komunumanoj por altigi sian teknikon. Ili vestoj kaj ŝuoj malsekiĝis de roso kaj iam ili eĉ ne havis tempon por manĝi pro streĉa laboro, tamen ili ne plendis pro tio.

Estis rikolta sezono de tritiko. Rigardante la tritikon de bona specio elkulturita de la lernantoj, la komunumanoj ĝoje diris: "En nia vilaĝo nun aperis 'agronometoj'."

La bona specio de tritiko "Tianza n-ro 2" elkulturita de Vej Tuanmin kaj liaj kunlernantoj estas nun disvastigata en la brigado.

Riĉaj Aktivadoj post

Lernohoroj

Aŭskulto de rakontado pri revoluciaj historioj




La Dua Elementa Lernejo de Aŭmen-strato, Ŝanhajo, estas funkciigata laŭ la proletara eduka linio de Prezidanto Maŭ.

Tie la geknaboj ĉiuj estas sanaj kaj viglaj. Ili organiziĝis laŭ sia intereso en diversaj grupoj por aktivadoj post lernohoroj, kiel la meteologia, radioaparata, aviadilmodela, propaganda, lignajista, agrikultura, hartonda, sporta k.a. Tiuj grupoj aktivadas post lernohoroj kaj iliaj multespecaj aktivadoj ebligis al geknaboj disvolviĝi en moralo, intelekto kaj korpo kaj sane kreski kiel daŭrigantoj de la revolucia afero de la proletaro.




Membroj-lernantoj de la revolucia komitato de la lernejo kune kun siaj amiketoj



Šnurtila konkurso

En nagejo







Sube: La lignajista grupo serioze riparas difektitajn tablojn kaj seĝojn de la lernejo.

Supre dekstre: Hartondistoj servas al siaj kamaraĵoj.


Sube dekstre: La agrikultura grupo detale notas la staton de kreskado de siaj plantaĵoj.







Provludo de sabro-danco



Ĉina Tablotenisa Delegacio en Tokio

VESPERE de la 21-a de marto de 1971, kun profunda amikeco de la ĉina popolo al la japana popolo, la Ĉina Tablotenisa Delegacio atingis Tokion, por partopreni la 31-an Mondan Tablotenisan Ĉampionecan Konkurson en Nagoja kaj fari amikan vizitadon al Japanio. Kiam la delegacio descendis de la aeroplano, la koridoro de la atendejo de la aerodromo jam estis plene ŝtopita de bonvenigantaj amasoj. Tuj je sia alveno, la delegacio jam dronis en intima batala amikeco de la japana popolo al la ĉina popolo. La bonvenigantaj amasoj svarme ĉirkaŭis la membrojn de la delegacio, varme etendis siajn manojn al la ĉinaj amikoj kaj donacis buketojn al la ĉinaj gefratoj. Oni diris, ke la entuziasma sceno estas senprecedenca

en la historio de amikeco inter la japana kaj ĉina popoloj.

La unuaj vortoj de Kenzo Nakajima, ĝenerala direktoro de la Japana-Ĉina Kulturinterŝanĝa Asocio je vido de la ĉinaj amikoj estis: "Varman bonvenigon al vi je via vizito al Japanio post kiam la Granda Proletara Kultura Revolucio gajnis grandan venkon." Li diris, ke la amika tajdo inter la japana kaj ĉina popoloj altiĝas jaron post jaro, sed neniam ĝi prosperis tiel vigle kiel hodiaŭ. Koji Goto, prezidanto de la Japana Tablotenisa Asocio, kiu speciale venis de Nagoja al Tokio por bonvenigo, longe atendis la alvenon de la ĉina delegacio en malvarma vento sur la aerodromo.

Amikoj diversrondaj kaj patriotaj ĉinoj en Tokio varme bonvenigas la Ĉinan Tablotenisan Delegacion al Japanio.





Fu Ĝihing, vicestro de la Ĉina Tablotenisa Delegacio, donacas broditan flagon al la Japana-Ĉina Kulturinterŝanĝa Asocio.

Ekstere de la koridoro de la atendejo, japanaj geamikoj tenis grandajn bonvenigajn sloganojn kaj patriotaj ĉinoj en Japanio, kiuj svingis la kvin-stelan ruĝan standardon, takte kriadis entuziasme “Vivu Prezidanto Maŭ”; ĉie aŭdiĝis la sonora kanto *Marnavigo Dependas de Stiristo*. Multaj emociiĝis ĝis larmoj.


Antaŭ la alveno de la ĉina delegacio, la japana popolo jam organizis Komitaton por Bonvenigi la Ĉinan Tablotenisan Delegacion el pli ol 500 membroj, kun Kenzo Nakajima kaj Kinkazu Saionji kiel estroj, kaj japanaj ĵurnaloj publikigis bonvenigajn artikolojn unuj post aliaj. Ja estas nepri-skribebla per vortoj la varma atendado kaj senkompara emociiĝo de la japana popolo, kiam la Ĉina Tablotenisa Delegacio venis inter la japanajn popolanojn post la akiro de gigantaj venkoj en la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj antaŭvespere de la 31-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso.

Antaŭtagmeze de la sekvinta tago post la alveno de la ĉinaj tablotenisaj sportistoj al Tokio, ili venis en la sportan halon de la Virina Mallongperioda Universitato Fuji por ekzerco, kaj ludis pilkon kun junaj sportistoj de tiu universitato. Multaj japanaj studentoj kaj pli ol 100 fremdlandaj ĵurnalistoj rigardis ilian ekzercon. Multaj japanaj gejunuloj elprenis siajn pilkofrapilojn kaj specialajn notlibrojn kaj petis ke ĉinaj sportistoj subskribu sian nomon sur ili por memoro; kaj kvin japanaj junulinoj faris amikan maĉon kun ĉinaj sportistinoj. La ekzerco

fariĝis kunveno por akceli la amikecon inter la gejunuloj de Ĉinio kaj Japanio. Iu japana ĵurnalo komentis poste, ke en la unua tago post sia alveno, la Ĉina Tablotenisa Delegacio jam donis al ni profundan impreson. Ĝi skribis, ke la sloganoj de la ĉina delegacio “amikeco unue, konkurso due” kaj “amikeco pli gravas ol venko” respegulis ĝian stilon.

La solida batala unuiĝo kaj amikeco inter la japana kaj ĉina popoloj refoje manifestiĝis en la akcepta kunveno, vespere de la 22-a, aranĝita de la Japana-Ĉina Kulturinterŝanĝa Asocio por celebri la 15-an datrevenon de ĝia fondo kaj bonvenigi la ĉinan delegacion. Pli ol mil japanaj amikoj el diversaj rondoj ĉeestis ĝin. Ĉiuj kunvenantoj gratulis unu alian pro la du eventoj de la 15-a datreveno de la fondiĝo de la Japana-Ĉina Kulturinterŝanĝa Asocio kaj la vizito de la Ĉina Tablotenisa Delegacio al Japanio. Multaj japanaj amikoj kantis kune kun la ĉinaj sportistoj la kantojn *Marnavigo Dependas de Stiristo* kaj *Eternan Vivon al Prezidanto Maŭ*. La sonoraj kantoj vibris en la vasta kunvenejo.

La akceptan kunvenon ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de japanaj laboristoj, kamparanoj kaj virinoj. Kun bondeziroj kaj donaco de la kamparanoj de Sanrizuka en batalo kontraŭ la starigo de milita bazo fare de la usonaj kaj japanaj reakciuloj, du kamparanaj reprezentantinoj el tiu loko rapidis al la kunveno kaj donacis ruĝan standardon



Ĉinaj sportistoj skribas sian nomon por japanaj sportistinoj.

al la ĉina delegacio en varma manklakado. Kiam ĉinaj amikoj esprimis, ke ili lernos de ili la heroan batalspiriton, la reprezentantoj diris, ke ili bone scias, ke la ĉina popolo ĉiam staras ĉe ilia flanko kaj ili nepre kondukos persisteme la batalon kontraŭ la usona imperiismo ĝis la fina venko.

La japanaj amikoj bone scias, ke la profunda amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj estas starigita sur la komuna bazo de unuiĝo por oponi kontraŭ imperiismo. Ankaŭ la ĉina popolo profunde kredas, ke kvankam la japana popolo iros zigzagan vojon en sia malfacila batalo, ĝia estonto tamen estos hela. Por celebri la 15-an datrevenon de la fondiĝo de la Japana-Ĉina Kulturinterŝanĝa Asocio, Guo Moĵuo, la honora prezidanto de la Ĉina-Japana Amikeca Asocio verkis jenan poemon:

*Neĝflokaj flirte flugaj bonvenigas la printempon,
Surmontaj umefloroj jen ridetas al la suno,
Je klariona voko alte el la firmamento,
Paradas buntkoloraj floroj mil kaj mil en kuno.*

Kiam la ĉina delegacio transdonis kaj voĉlegis la gratulan poemon al la Japana-Ĉina Kulturinterŝanĝa Asocio, varma manklakado aŭdiĝis en la kunvenejo. La 72-jaraĝa Bon Ŝiraiŝi, fame konata persono de la japanaj kulturaj rondoj, diris al ĵurnalistoj: La poemo profunde esprimis lian koran senton. Li diris, ke lia plej granda aspiro estas kompletigi lian komencitan tradukadon de poemoj de Prezidanto Maŭ per plej ĝusta japana lingvo en plej mallonga tempo, por pliapaŝe fortigi la amikecon kaj solidarecon inter la japana kaj

ĉina popoloj kaj por ke la japana popolo pli bone komprenu la grandan penson de Prezidanto Maŭ.

La 23-an de marto, artistoj de la Macujama Baleda Trupo ludis la ĉinan baledon *Blankhara Knabino* por la ĉina delegacio. Ilia prezentado multe kuraĝigis la membrojn de la ĉina delegacio. Junulo, kiu ludis rolon de kamparano en la baledo, diris al ĵurnalistoj, ke li suferis turmentadon de mizera vivo en pasinteco, kaj post sia partopreno en la ludado de la baledo *Blankhara Knabino* li profunde sentas, ke la nunaj suferoj de la japana popolo tute similas al tiuj de la ĉina popolo en la malnova Ĉinio, tial la bataloj de la japana kaj ĉina popoloj havas komunan bazon kaj subtenas unu la alian. Alia junulo diris, ke en prezentado de la baledo li akiris pli profundan komprenon pri la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ kaj firme decidis servi al la laboristaj kaj kamparanaj amasoj de Japanio prenante literaturon kaj arton kiel batalilon.

La batala amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj havas longan tradicion. En la mallonga vizitado de tri tagoj en Tokio, oni jam profunde sentis, ke la amikeco kaj unuiĝo por opono kontraŭ imperiismo inter la du popoloj havas solidan fundamenton kaj disvolviĝas kun ĉiu tago. Tiu batala amikeco estas senmorta kaj senĉesa kiel la alta monto Fuji kaj la longa Jangzi-rivero. Ĝi estas barebla kaj detruenda de nenia reakcia forto. Kaj tiu ĉi tajdo de nia epoko rompos ĉian baron kaj torente ruliĝos antaŭen.

La Ārĝenta Pilko

Komunikas Āmikecon

—Plena Sukceso de la 31-a Monda Tablotenisa Ĉampionea Konkurso

DE la 28-a de marto ĝis la 7-a de aprilo, la 31-a Monda Tablotenisa Ĉampionea Konkurso solene iris en la Aiĉi-gubernia Gimnastika Halo de la japana urbo Nagoja. Ĝin partoprenis sportistoj de pli ol 50 landoj kaj regionoj de la kvin kontinentoj.

La ĉinaj sportistoj harditaj en la Granda Proletara Kultura Revolucio, unuafoje en la lastaj ses jaroj, sendis siajn reprezentantojn por partopreni la ĉampionecon konkurson. La Ĉina Tablotenisa Delegacio konsistis el 60 personoj, kun Ĝaŭ Ĝeng-hong, la respondeculo de la Ĉina Ĝenerala Sporta Asocio, kiel estro, kaj Fu Ĝihing, Vang Hiaŭjun kaj Lu Ting kiel vicestroj kaj Song Ĝong kiel ĉefsekretario kaj Pan Ĝigang kiel vicĉefsekre-

tario. El la 22 sportistoj estas 11 virinoj, nome Lin Hujking, Ĝeng Mingi, Liang Liĝen, Li Li, Ĝeng Huajjing, Ĝang Li, Lin Mejkjun, Feng Mengja, Ju Hiuping, Hu Julan kaj Hju Giankin; kaj 11 viroj, nome Ĝuang Zedong, Li Fuĵong, Ĝoŭ Lansun, Li Gingguang, Hi Enting, Liang Geliang, Vang Venhua, Vang Venjong, Diaŭ Venjuan, Ju Ĉangĉun kaj Ĝang Hielin. La estro de la virina teamo estis Fu Ĝaŭloŭ kaj ĝia vicestro Lin Hujking; la estro de la vira teamo estis Ĝaŭ Jisi. La ĝenerala trejnisto de la vira kaj virina teamoj estis Guan Hujguang. La trejnistoj de la virina teamo estis Vang Ĝiliang, Ma Ginbaŭ kaj Liang Joŭneng; tiuj de la vira teamo estis Hju Jinŝeng, Ĝuang Giafu kaj Li Ŝusen. Ili kunportis al la popoloj de Japanio

Maĉo en irado



kaj aliaj landoj la amikecon kaj salutojn de la ĉina popolo.

En tiu konkurso la nombro de la sportistoj de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, Nepalo, la Unuigita Araba Respubliko, Meksikio, Kolombio kaj aliaj landoj kaj regionoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko plimultiĝis kompare kun tiuj de la lastaj du konkursoj. Tio montras, ke tablotenis sporto senĉese disvolviĝas en tiuj regionoj kaj la popoloj de tiuj regionoj pli kaj pli fortigas sian amikan interrilaton kun la aliaj popoloj de la mondo.

Multaj konataj tablotenisaj teamoj de Eŭropo, kiel la rumana, jugoslava, hungara, sveda kaj brita, partoprenis tiun ĉi ĉampionecan konkurson.

Inter la partoprenintoj de la konkurso, plej multaj estis la japanaj sportistoj — entute 32 tablotenisistoj. De multaj jaroj, la japanaj sportistoj tenadis bonajn atingojn en la mondaj tablotenisaj ĉampionecaj konkursoj.

Amikaj kontaktoj kaj maĉoj inter la sportistoj dum la konkurso respegulis la fortan deziron de la diverslandaj popoloj de la mondo al amikeco. Tiun ĉi ĉampionecan konkurson la ĉinaj sportistoj partoprenis kun la spirito “amikeco unue, konkurso due” kaj akiris laŭdon kaj subtenon de diverslandaj sportistoj kaj japanaj amikoj. Dank’ al tiu ĉi konkurso, la ĉinaj sportistoj konatiĝis kun multaj novaj amikoj kaj lernis multajn utilaĵojn de sportistoj el diversaj landoj.

En tiu ĉi konkurso, ĝenerale altiĝis la tablotenisa arto de la sportistoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj Eŭropo kaj aperis multaj elstaraj junaj sportistoj.

En tiu ĉi konkurso, la ĉina teamo gajnis la ĉampionecojn de vira kolektivo, virina unuopo, virina duopo kaj geduopo, kaj krome ankaŭ akiris la subĉampionecojn de virina kolektivo, virina unuopo kaj vira duopo. La japana teamo gajnis la ĉampionecon de virina kolektivo kaj subĉampionecojn de vira kolektivo, vira unuopo kaj virina duopo. Sveda sportisto gajnis la ĉampionecon de vira unuopo. Hungaraj sportistoj gajnis ĉampionecon de vira duopo. Rumana kaj jugoslava sportistoj gajnis subĉampionecon de geduopo.

Vespere de la 7-a de aprilo, post la ceremonio de disdono de la premioj por konkursoj de virina unuopo kaj vira unuopo, H. Roy Evans, prezidanto de la Internacia Tablotenisa Federacio, deklaris la finon de tiu ĉi ĉampioneca konkurso. Li ankaŭ deklaris, ke la 32-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso okazos en aprilo de 1973 en Jugoslavio.

Post la ĉampioneca konkurso, la Ĉina Tablotenisa Delegacio faris amikan viziton al multaj japanaj lokoj kaj forlasis Tokion al sia patrolando en la posttagmezo de la 30-a de aprilo, portante batalan amikecon de la japana popolo al la ĉina popolo.

Geduopo: Ĝang Hielin kaj Lin Hujking de Ĉinio kontraŭ Anton Stipancic de Jugoslavio kaj Maria Alexandru de Rumanio





Pli ol 100 tablotenisaj sportistoj de aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj laŭinvite partoprenas amuzan kunvenon por ĝoje esprimi amikecon kaj interŝanĝi sperton. Jen ĉinaj sportistinoj kantas revuciajn kantojn por la amikoj.

La tablotenisaj teamoj de Ĉinio kaj Koreio interŝanĝas siajn teamajn flagojn.





Hungaraj tablotenisistoj donas al ĉinaj tablotenisistoj donacaĵon.

Ĉinaj sportistoj skribas sian nomon por ganaaj sportistoj.





Ĉinaj kaj japanaj sportistoj interparolas amike.

Kenzo Nakajima (la tria de dekstre), ĝenerala direktoro de la Japana-Ĉina Kulturinterŝanĝa Asocio, Ĝaŭ Ĝenghong (la dua de dekstre), estro de la Ĉina Tablotenisista Delegacio, kaj ĉinaj tablotenisistoj fottiĝis kun la artistoj de la Macujama Baleda Trupo de Japanio post ties prezentado de la ĉina baledo Blankhara Knabino.





Ĉina, japana kaj usonaj sportistinoj tintigas la glasojn.

Solena disdono de premioj al la venkintoj en maĉoj de vira kolektivo





Rapide Disvolviĝas la Lokaj Industrioj en Tibeto

Nokta aspekto de la Nagin-a Hidroelektrejo de Tibeto

EN la 20 jaroj post la Liberiĝo, precipe ekde la Granda Proletara Kultura Revolucio, sub la intima zorgo de la granda gvidanto de ĉiuj naciecoj de nia lando Prezidanto Maŭ, la lokaj industrioj en Tibeto, konata kiel “firsto de la mondo”, rapide disvolviĝis, komencante de nulo.

Nun la Tibeta Aŭtonoma Regiono jam starigis kelkdek industriojn, inkluzive de karbo, hidroelektro, maŝinkonstruo, kemio, konstrua materialo, papero, ŝpintekso, ledo, alumeto kaj sapo. La regiono jam havas preskaŭ 100 mezajn kaj malgrandajn hidroelektrajn staciojn, kaj nombro da novaj hidroelektraj stacioj estas en konstruado; en Lhasa, Ŝkaze, Nagĉu, Montsudo, Ĉamdo kaj aliaj distriktoj jam stariĝis ripara kaj fabrika industrio de agrikulturaj maŝinoj. La disvolviĝo de la lokaj industrioj liveras pli kaj pli multajn irigaciajn kaj prilaborajn maŝinojn kaj trafikajn instrumentojn al la produkto de agrikulturo kaj bestobredado en Tibeto kaj tiel ebligis al ili sinsekvajn riĉrikoltojn en la lastaj jaroj.

Antaŭ la Liberiĝo, sub la reakcia kaj feŭda servuta reĝimo, Tibeto tute ne havis lokajn industriojn. Eĉ alumeton, pioĉon, malgrandan ŝraŭbon ĝi ne povis fabriki. Tiam estis nur malmultaj forĝistoj, kiuj kapablis ripari nur simplajn malgrandajn

agrikulturajn instrumentojn. Pro manko de industrio, ankaŭ la agrikulturo de Tibeto troviĝis en primitiveco.

En 1951, sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, Tibeto liberiĝis. Post likvido de la ribelo de la reakcia kliko de superaj socitavoloj de Tibeto en 1959, estis realigita la demokratia reformo. La vasta amaso de liberigitaj servutuloj fariĝis mastro de la nova socio kaj aktive partoprenas la konstruadon de socialisma industrio kaj agrikulturo. Dank’ al la helpo de frataj provincoj kaj urboj, je la fino de 1964, la aŭtonoma regiono konstruis 67 mezajn kaj malgrandajn fabrikojn de agrikulturaj instrumentoj, aŭtoriparado, cemento, ledo, lignoprilaborado kaj aliaj, kiuj metis unuan fundamenton por la disvolviĝo de lokaj industrioj.

Sed, kiam rapide disvolviĝis la lokaj industrioj en Tibeto, la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj praktikis tie kontraŭrevolucion reviziisman linion. Pretekstante “apartajn kondiĉojn” kaj “subevoluintecon” de Tibeto, ili malhelpis la milionan liberigitan servutularon disvolvi la lokajn industriojn laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ “**sinapogi sur propraj fortoj**” kaj “**peneme lukti en malfaciloj**”, tiel ke

multaj jam fonditaj mezaj kaj malgrandaj fabrikoj kaj minejoj estis fermitaj.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la tibeta popolo de diversaj naciecoj aktive studis Maŭzedongpenso kaj forte kritikis la kontraŭ-revolucian reviziismon de la bando de Liu Ŝaŭki, tiel ke enradikiĝis en la koron de la popolo la proletara linio de Prezidanto Maŭ en entreprenado, kaj denove disvolviĝis rapide la lokaj industrioj en Tibeto. La nombro de fabrikoj kaj minejoj nove konstruitaj en la 4 jaroj de la Granda Proletara Kultura Revolucio multe superis tiun en la 15 jaroj post la Liberiĝo de Tibeto.

En vintro de 1966, sub la direktado de Maŭzedongpenso, nombro da hanaj laboristoj kaj tibetaj paŝtistoj, travadinte neĝon kaj glacieron en frosta vento kaj venkinte multajn malfacilojn, sukcesis konstrui la Maĉala-an Karbominejon, situantan plej alte en la mondo sur dezertaj montoj, pli ol 5,000 metrojn altaj super la marnivelo, kontribuante al la socialisma konstruado.

En Tibeto estas rakontata inter la amasoj la mirinda sukceso de iu malgranda fera kaj ligna prilaboro en produktado de tri specoj de hidroelektraj maŝinoj. Kun dudek kelkaj laboristoj tiu fabriko antaŭe povis produkti nur simplajn agrikulturajn instrumentojn. Por rapide disvolvi la hidroelektran aferon en Tibeto, ĝiaj laboristoj kuraĝe prenis

sur sin la taskon provfabriki dinamojn, elektrajn motorojn kaj hidraŭlikajn turbinojn. Dum provado, ili starigis teknikan grupon konsistantan el maljunaj laboristoj, teknikistoj kaj gvidaj kadroj. La grupo disrompis superstiĉon kaj liberigis la penson. Ĉe renkonto de malfaciloj, ili sendis homojn lerni de aliaj fabrikoj kaj samtempe faris la eksperimentadon. Kiam mankis al ili granda ilmaŝino dum prilaborado de muldaĵo, ili mem elfaris tian per reformo de iu alia. Post senĉesa klopodo, ili sukcesis fine en sia provado kaj produktas serie dinamojn, elektrajn motorojn kaj hidraŭlikajn turbinojn.

Kun la vigla disvolviĝo de la lokaj industrioj de Tibeto, la unua generacio de tibetaj laboristoj nombriĝas jam kelkaj dekmiloj. Inter ili aperis multaj aktivuloj de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso kaj multaj elstaraj tibetaj laboristoj harditaj en la Granda Proletara Kultura Revolucio jam plenumas gvidajn laborojn en revoluciaj komitatoj de diversaj niveloj. Ili estas viglaj kaj freŝaj fortoj en socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de Tibeto.

Ĉi-jare en Tibeto nombro da novaj fabrikoj kaj minejoj estas en planado aŭ en konstruado. La laboristoj de Tibeto decidis pli energie fari ankoraŭ pli grandan kontribuon en la plua disvolvo de la lokaj industrioj.

Hana kaj tibeta laboristinoj de la Linĝi-a Lanŝpinejo interŝanĝas produktan sperton.




Malgranda Ŝtala Kombinumo de Giaŭdong-duoninsulo

LA regiono Jantaj de Giaŭdong-duoninsulo estas fame konata de la tuta Ŝandong-provinco pro konstruado de malgranda ŝtala kombinumo per la saĝo kaj forto de la amasoj. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, per nur pli ol 2 jaroj, oni konstruis tie malgrandan ŝtalan kombinumon kun sekcioj de minekspluato, ercoelekto, sferigo, sintrado, ferfandado, ŝtalfandado kaj laminatado,

kaj per tio finis sian historion de neprodukto de fero kaj ŝtalo.

Post la komenco de produkto en oktobro de 1969, la malgranda ŝtala kombinumo jam montris sian grandan potencon. Per multaj bonaj feraj kaj ŝtalaj materialoj, ĝi forte stimulis la disvolviĝon de agrikultura mekanikigo kaj lokaj industrioj

Antaŭ Alt forno





Observo de ŝtallikvo

de la regiono, kaj ankaŭ helpis la nacidefendan konstruadon. La vastaj revoluciaj amasoj laŭdis, ke ĝi estas nova frukto de la granda kultura revolucio kaj venko de la principo ellaborita de Prezidanto Maŭ pri samtempa disvolvo de industrioj administrataj de centra kaj lokaj aŭtoritatoj, samtempa disvolvo de grandaj kaj mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj kaj samtempa disvolvo de entreprenoj funkciigataj per modernaj kaj simplaj metodoj.

En la komenca periodo post la Liberiĝo, la regiono Jantaj ne havis sian propran ŝtalan industrion, ĝi eĉ devis postuli de la ŝtato feron kaj ŝtalon por fari sarkilojn kaj falĉilojn, por ne paroli pri produkto de agrikulturaj maŝinoj. La tiea popolo de longe aspiris mem disvolvi la lokan feran kaj ŝtalan industrion por fari kontribuojn al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

En la granda antaŭensalto en 1958, sub la kuraĝigo de la ĝenerala linio elmetita de Prezidanto Maŭ **“Streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie”** kaj liaj aliaj grandaj alvokoj pri amasa entreprenado de fera kaj ŝtala industrio, la popolo de la regiono rapide levis amasan movadon por disvolvi feran kaj ŝtalan industrion. En mallonga tempo ili jam konstruis 4 minejojn, pli ol 20 malgrandajn altfornojn kaj unu ŝtalfabrikon kun certa skalo, produktis feron kaj ŝtalon kaj movis per ili la disvolviĝon de industrio kaj agrikulturo.

Sed, por restaŭri kapitalismon, la renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la regiono Jantaj freneze opoziciis la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Ili kantis en sama tono kun imperiismo, reviziismo kaj reakciuloj, kalumniis ke amasa entrepreno de fera kaj ŝtala industrio “donas pli multe da damaĝo ol profito kaj alportas nur penigojn kaj perdojn al la popolo”. Utiligante la uzurpitan parton de gvidanteco ili senbride detruis tiun amasan movadon, tiel ke en tiu regiono detruigis multaj ekipaĵoj specialaj por fera kaj ŝtala industrio, mezuraj instrumentoj kaj maŝinoj dek-milojn da juanoj kostantaj fariĝis ferruboj kaj la minejoj kaj ŝtalfabriko peneme konstruitaj de la popolo de Jantaj estis forlasitaj.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ, erupciis la subpremata arda entuziasmo de la popolo por disvolvi feran kaj ŝtalan industrion. En februaro de 1967, la popolo de tiu regiono deprenis la regpotencon de la agentoj de Liu Ŝaŭki en tiu regiono, establis revolucionan komitaton, ĝisfunde kritikis la ĝisĉielajn krimojn de Liu Ŝaŭki kaj komencis rekonstrui la minejojn kaj ŝtalfabrikon sub la gvido kaj zorgo de la Centra Komitato de la Partio kaj la provinca revolucia komitato. La komandantoj kaj batalantoj de trupo de ĈPLA garnizonanta en la regiono Jantaj, laboristoj kaj ministoj de tiu loko partoprenis rekonstruadon de la ŝtalfabriko. Ankaŭ malriĉkampanoj kaj



Sferigitajo anstataŭis sintritajon.

malsuperaj mezkampanoj de antaŭurbo de Jantaj venis kun granda entuziasmo por partopreni la konstruadon.

En majo de tiu jaro, konstruiĝis la unua malgranda altforno de la fera fabriko kaj en la sekvinta jaro konstruiĝis la ŝtala fabriko. En 1969 konstruiĝis unu post alia minejoj, ercoelektoj kaj laminatoj.

La tuta malgranda ŝtala kombinumo estis konstruita sub direktado de la principo de Prezidanto Maŭ “**sinapogi sur propraj fortoj**” kaj “**peneme lukti en malfaciloj**”. En la komenca periodo de la konstruado, kvankam estis tre multaj malfaciloj en mono, materialoj, ekipaĵoj kaj teknikoj, la laboristoj tamen ne petis de la ŝtato monon, homojn kaj ekipaĵojn.

La bezonata mono por la konstruado de la fabriko venis de financa akumulo de la regiono kaj redukto de elspezo neporprodukta. Dum la konstruado oni rigore plenumis la principon “entrepreni diligente kaj ŝpareme, utiligi ĉion ekzistantan ĉe mano”. Ekzemple, la ŝtala fabriko kons-

truiĝis sur la malnova bazo de iu maŝinfabriko; ankaŭ la ferminejoj kaj ferfabriko utiligis iujn malnovajn domojn; aŭtoj kaj oficejaj necesajoj plejparte estis pretigitaj de ili mem.

199 el la 240 ĉefaj ekipaĵoj de la tuta kombinumo estis fabrikitaj aŭ riparitaj de laboristoj mem. La tri varmblovaj fornoj de la ferfabriko estis faritaj el pli ol 1,000 kunvelditaj ŝtalaj pecetoj. Ĉiuj vizitantoj ricevis vivecan edukon pri diligenta kaj ŝparema konstruado de la lando.

La laboristoj, kiuj unuaj venis al la minejo, manĝis ĉe komunumanoj kaj dormis sur la planko. En la komenca periodo de la konstruado ili havis nur tri ŝraŭbpremiojn, unu smirgan radon manmovatan kaj unu fajrejon por forĝado. Kaj per ili la laboristoj komencis prilabori kaj munti minejajn ekipaĵojn. Konstanta magneta ercoelekta maŝino bezonis trogon el rustimuna ŝtalplato kun longo de 2 metroj, larĝo kaj alto de 1 metro. La trogo devas esti prilaborita el rustimuna ŝtalplato kun dikeco

de 3 milimetroj. Sed en la minejo ne estis kurbiga maŝino. Laboristo Ĝang Daŭhi diris: “Erco estas nutraĵo de altforno. Se ni ne povos liveri ercon, oni ne povos produkti feron. Ni mem faru ĝin, kiel ajn peniga estas la laboro!” Kun aliaj laboristoj sub lia gvido, li faris la trogon el rustimuna ŝtalplato per martelado. Disvolvante la neelĉerpeblan saĝon kaj penlaborem, la laboristoj fabrikis unun post alia konstantajn magnetajn ercoelektajn maŝinojn, rimentransportilojn, klasigilojn kaj aliajn. Ili konstruis siajn proprajn minejojn kaj fundamente efektiviĝis ĝian mekaniĝon.

La minejoj garantiis normalan provizadon de erco. Samtempe, vaste disvolvante la amasan movadon de teknika renovigo, la laboristoj kiel eble plej multe aplikis progresajn teknikojn. Tiel en la produkto de fero kaj ŝtalo efektiviĝis stabila alta produkto.

En la komenco, la ferfabriko uzis sintritajon kiel krudmaterialon, sed nun ĝi jam uzas anstataŭe sferigitajon. La laboristoj nomas tian sferon el mi-

nerala pulvoro produktita de ercoelekta maŝino "delikata nutraĵo". Tiu renovigo ne nur ebligis ŝparon de multe da laborforto kaj altigon de la utiligebleco de mineralo, sed ankaŭ bonigis la kvaliton de fero. Anstataŭigi sintritajn per sferigitajn estas nova tekniko kompare komplika. Se oni fabrikas ekipaĵojn por sferigado per malnova metodo, oni devas multe elspezi kaj akiri profiton nur post longa tempo. La laboristoj lernis de aliaj feraj kaj ŝtalaj fabrikoj en la provinco kaj akumulis sperton en ripetada praktiko. Ne havante ekipaĵojn kaj materialojn, ili uzis anstataŭe uzitajn, malnovajn aŭ surogatajn materialojn. Ekzemple, ili kribris karbopulvoron per malgranda kribrilo, pesis materialon per malgranda pesilo, sferigis per lavkuvo kaj uzis eluzitajn aŭtomobilajn dentradojn en transmision. Post pli ol 100 provoj, ili sukcesis finfine fari sferigitajn per siaj propraj metodoj kaj pliapaŝe garantiis produkton de bonkvalita fero en granda kvanto.


En la produkto de ŝtalo, kontinua ingotigo kaj L-D-procedo estas avangardaj teknikoj. Por produkti pli multe da bona ŝtalo, la laboristoj de la malgranda ŝtala kombinumo de Jantaj kuraĝe praktikis, farante eksperimentojn foj-refoje kaj en mallonga tempo mastris tiujn novajn teknikojn.

Post sukcesa fero de maŝino por kontinua ingotigo en 1969, la laboristoj sukcesis fabrikigi oksigenproduktilon kaj jam komencis ĝin uzi. En la lastaj jaroj, per la spirito de kontinua revolucio, ili faris pli ol 40 teknikajn renovigojn.

La kombinumo persistas en la direkto de servo al agrikulturo. 60% de la fero produktita de la kombinumo estas uzita por produkto de agrikulturaj maŝinoj. En 1967, la gubernio Lajhi de tiu regiono urĝe bezonis pli ol 250 tunojn da fero por akvoutiliga konstruado kaj ĝuste en tiu tempo la malgranda altforno de la fabriko komencis produkti feron. La laboristoj tuj helpis la gubernion per fero produktita de ili. En la lastaj jaroj, per fero produktita de si mem kaj ŝtalo liverita de la ŝtato, la regiono fabrikis 45,000 dizelojn, traktorojn, pumpilojn, elektrajn motorojn, falĉmaŝinojn kaj aliajn maŝinojn de draŝado, disrompado kaj muelado. Ĉar la regiono produktas pli kaj pli multe da fero kaj ŝtalo, la mekanika energio de ĉiu brigado de la regiono en 1970 grandiĝis je 1.7 obloj kompare kun tiu de 1966. La plejparto de fero kaj ŝtalo uzataj en konstruado de grandaj maŝinoj por kampara irigacia sistemo estis liverita de la regiono. La vigla disvolviĝo de la malgranda ŝtala kombinumo de Jantaj alportis pli belan perspektivon al la agrikultura mekanikigo de la regiono.

Memfaritaj ekipaĵoj faras fosadon kaj transportadon de ercoj.





Jintaj-a akvokondukanta barajo

Hidroelektra Stacio sur Kingtong-monto

LAŭ la deklivo de la alta monto Kingtong kuŝas kontraŭprema cementa tubolinio 368 metrojn longa, simila al giganta arĝenta drako; la ruliĝanta akvo de Kingtong-rivero venas de loko pli ol 25 kilometrojn fora trapasante 87 montpintojn laŭ la kanalo; en la maŝindomo ĉe la montpiedo, rapidege turniĝas la 1,600-kilovata hidraŭlika dinamo sub la komando de aŭtomata rapidoreguligilo; ekster la domo alttensiaj dratoj etendiĝas foren trans la kontinua montaro. Kiel belan bildon kreis la popolo de Luoding-gubernio de Guangdong-provinco per la konstruo de la hidroelektra stacio Kingtong.

Antaŭ la Liberiĝo, Luoding havis nur 50,000 muojn da kampoj irigaciataj. Jene oni priskribis tiun mizeran montregionon antaŭ la Liberiĝo:

*Sub la monto la rivero fluas senutile,
Sur la monto akvo karas oleo-simile,
Ĉiujare sub sociaj kaj naturaj plagoj,
La kampuloj ĉiam vivas triste, malfacile.*

Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, la popolo energie entreprenis akvoutiligan konstruadon kaj en la areo de 360,000 muoj da kampoj nun jam formiĝis irigacia reto por "alkonduko, konservo kaj levo de akvo". Dank' al tio radike ŝanĝiĝis la mizera fizionomio de la regiono ofte suferanta de sekeco.

La venka produkto de elektro de la hidroelektra stacio Kingtong estas venko de la popolo de Luoding en akvoutiliga konstruado per siaj propraj fortoj.

ELHAKI NOVAN VOJON

Iun profundan nokton de julio de 1969, en la kunveno de la revolucia komitato de la gubernio Luoding, la membroj de la revolucia komitato faris varman diskuton pri mono, materialoj, tekniko kaj aliaj problemoj en konstruado de la hidroelektra stacio Kingtong. Tiam la gubernio havis nur 3,000 juanojn kiel cirkulan monon, sed laŭ unuapaŝa antaŭkalkulo, la konstruado bezonas 6 milionojn da juanoj. “Ĉu ni sukcesos en tio sen investo de la ŝtato?” Iuj dubis.

Ĉu “peti helpon de la ŝtato” aŭ “mem prepari ĉion necesan”? Ĉiuj frontas la akran demandon. Sub la gvido de la estro de la gubernia revolucia komitato Huang Guo, la membroj de la komitato esploris ĉiujn montojn kaj riverojn ambaŭflanke de Kingtong-rivero, kolektis multajn opiniojn de amasoj kaj faris firman decidon: nepre elhaki novan vojon per la forto de la vastaj amasoj por multe, rapide, bone kaj ekonomie konstrui la hidroelektran stacion Kingtong.


Kiam disvastiĝis la informo, la amasoj de la tuta gubernio dronis en granda ĝojo kaj pretis kontribui sian tutan forton. Sed iuj ĉagreniĝis pro manko de hidrologia materialo k. s. Malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj sonore diris: “Vi nur diru, kion vi bezonas!” Komence maljuna malriĉkampano Huang Liangĝou de Dumen-brigado ne sciis, kio estas “hidrologia materialo”, sed post kiam li komprenis tion, li tuj iris al teknikistoj kaj diris al ili: “Tio ne estas mistera. En la malnova socio, por vivteni min, mi kolektis brullignon en montoj kaj klare scias, kiom longaj estas la kavegoj, kiom profundaj estas la akvoj en la kavegoj kaj kiom alte ŝveliĝis la rivero en la pasintaj jaroj.”

La spirito de la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj “kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi” donis grandan inspiron al la teknikistoj.

Komenciĝis mezurado de la kanala linio. Komunumanoj grimpis sur krutajn rokojn kun celstangoj kaj markpalisoj por helpi la teknikistojn. Kaj dank’ al tio, estis rapide mezurita senerare la kanala linio kiu havas longecon de pli ol 25 kilometroj kaj trapasas 87 montpintojn kaj 25 profundajn kavegojn.

BATALO EN PROFUNDA MONTARO

Antaŭ komenco de konstruado de la hidroelektra stacio, la vastaj amasoj konkure anoncis sin



Surmonta kanaletto

por partopreni la laboron. Laŭ la plano de la komandejo de la konstruo estis bezonataj 10,000 homoj en la unua periodo, sed pli ol 30,000 komunumanoj sin anoncis. Post multfoja deadmono iuj reiris hejmen, sed ankoraŭ restis 12,000. Aŭdinte ke baldaŭ komenciĝos konstruo de la hidroelektra stacio, maljuna malriĉkampano Li Tengfang de Ŝuangdong-komunumo tiel ĝojiĝis, ke li ne povis fermi sian buŝon. Li rapidis al la komunuma oficejo por sin anonci. Iu kamarado de la komunuma revolucia komitato diris: “Onklo Li, vi estas maljuna kaj la loko estas malproksima, do lasu tion al la junuloj!” Sed Li Tengfang diris insiste: “Kompare kun junuloj, mi estas

iom aĝa, sed kompare kun Malsaĝa Avo, mi estas ankoraŭ juna. Malsaĝa Avo povis translokigi monton, kial do mi ne povas iri konstrui hidroelektran stacion?" Kiam la konstruantoj de la komunumo ekiris, li sekvis ilian kolonon kun ŝovelilo kaj tornistro surŝultre, malgraŭ deadmono de aliaj.

Ĝuste kiam Li Tengfang persiste petis partopreni konstruadon de la hidroelektra stacio, Onklino Tan de Mingging-brigado de Dumen-komunumo haste venis al la oficejo de la brigado. Ŝi tre ĝojis, kiam ŝi aŭdis ke pli ol 10,000 homoj venos en la montojn por konstrui hidroelektran stacion. Ŝi pure balais en kaj ekster la ĉambro, falĉis multe da sekaj herboj sur monto kaj faris el ili kelkajn matracojn kaj poste iris al la gvidantoj de la brigado kaj diris al ili: "Baldaŭ venos konstruantoj de la hidroelektra stacio. Mia domo estas vasta kaj mi povas akcepti kelkajn homojn. Nun ĉio estas preta!" La gvidantoj de la brigado faris enketon kaj trovis,


ke ĉiu familio jam pretigis dormejojn por gastigi alvenontajn konstruantojn. Oni do ne bezonis konstrui barakojn por la konstruantoj.

Ĉiu popolano de Luoding estas bravulo en batalo kontraŭ la naturo. La milica subplotono el 12 junuloj de Giaji-komunumo luktis kvazaŭ aro da sentimaj tigridoj.

Iu roko kun alto de pli ol 20 metroj baris la vojon de la kanalo. Ĝi estis alta, kruta kaj glata kaj estis tre malfacile ĝin forigi. La 12 junuloj persiste atakis ĝin per grandaj marteloj kaj forigis la baron finfine.

Tiaj bravuloj, kiuj tute maltemis malfacilojn kaj kuraĝe batalis en profundaj montoj, estas nekalkulebaj sur la konstruejo de la hidroelektra stacio. Post penema batalo de 7 monatoj, la konstruantoj forportis pli ol 900,000 kubmetrojn da teraĵo kaj 400,000 kubmetrojn da ŝtonoj kaj ŝanĝis la fluejon de la rivero Kingtong!

Magiangkoŭ-a pumpstacio



FABRIKI CEMENTAJN TUBOJN


Iun julian matenon de 1970, la suno bele radiis.

Sur la placo de la Fabriko de Akvoutiligaj Antaŭpreparitaj Ferbetonaĵoj de Luoding-gubernio pli ol 100 laboristoj kolektiĝis ĉirkaŭ la ekzamena maŝino. Ili metis sur la maŝinon ferbetonan tubon longan je 4 metroj kun kalibro de 80 centimetroj por pruvi, ĉu ĝi povas elteni premon de 20 kilogramoj sur ĉiu kvadrata centimetro.

Kiam la pli ol 12,000 konstruantoj batalis tagnokte sur la monto Kingtong, ankaŭ laboristoj de la Fabriko de Akvoutiligaj Antaŭpreparitaj Ferbetonaĵoj batalis por fabriki cementan tubon. Tra la kanalo fluas ĉiusekunde 5 kubmetroj da akvo kaj la akvofalo altas je 142 metroj. Laŭ kalkulo de la komandejo, por fabriki la necesajn kontraŭpremajn tubojn oni bezonis pli ol 300 tunojn da ŝtalo. La gubernia revolucia komitato petis ke laboristoj de la fabriko diskutu pri tio. Vicestro de la revolucia komitato de la fabriko, maljuna laboristo Fan Hengli diris: "La konstruado de la ŝtato bezonas multe da ŝtalo; bona ŝtalo devas esti uzata ĉe plej grava loko. La kontraŭpremajn tubojn ni faru el cemento!"

Post ripetada eksperimento la fabriko venkis multajn malfacilojn kaj sukcesis elfari la unuan tubon. Ili metis la tubon sur la ekzamenan maŝinon kaj kiam la premo leviĝis ĝis 15 kilogramoj sur ĉiu kvadrata centimetro, akvo jam penetris el la tubo. Studinte kune kun laboristoj la instruon de Prezidanto Maŭ "malsukceso estas patrino de sukceso", Fan Hengli diris kun plena memfido montrante la tubon sur la provmaŝino: "Ni devas tiri lecionon el la malsukceso. Vidu, tiu longa tubo ellasas akvon nur el la meza sed ne el la du ekstremaj partoj, do ni povos atingi ke ankaŭ la meza parto ne ellasos akvon!" Kune kun aliaj li atente observadis la lokon kie ellasiĝis akvo kaj trovis, ke la difekton kaŭzis neĝusta metodo de enmeto de materialo dum la fabrikado. Tiam, ili komencis la sepan eksperimenton. Fan Hengli ŝaltis la motoron kaj la montrilo montris, ke altiĝas la premo de la enfluanta akvo. Kiam la montrilo sin direktis al 15 kilogramoj, morta silento regis la ĉeestantojn. Daŭre altiĝis la premo. Kiam la montrilo montris 23 kilogramojn, varma aklamo eksplodis en la homamasoj. Sukcesis la eksperimentoj! La laboristoj produktis 92 kontraŭpremajn cementajn tubojn kun totala longeco de 368 metroj por anstataŭigi ŝtalajn kontraŭpremajn tubojn.

Sed la afero ankoraŭ ne finiĝis. Ĉiu el la 92 tuboj pezas je 2,800 kilogramoj. La akvonivela



*Luohing-brigada pumpstacio
kun levdistanco de 126 metroj*

diferenco de la stacio estas 142 metroj, alta estas la deklivo kaj kruta la vojeto. La konstruejo havis nur du ordinarajn puliarojn, el kiuj unu estis difektitita. Kiel munti? Fan Juhua, malnova kunbatalanto de Fan Hengli, multe cerbumis pri tio. Subtenate de la armea reprezentanto de la komandejo de la konstruo, li fabrikis lignan platĉaron. Ili metis tubon sur la ĉaron per puliaro kaj poste instalas vinĉon sur la monto. Sed apenaŭ la vinĉo ekturniĝis, la kvar radoj de la ĉaro eniĝis en la teron kaj la ĉaro estis neniel movebla. Fan Juhua kaj aliaj laboristoj tuj interkonsiliĝis kaj decidis sterni antaŭ la ĉaro moveblan lignan trakon. Kaj fine la tuboj estis portitaj sur la altan monton.

Homoj armitaj per Maŭzedongpenso havas neelĉerpeblan saĝon. Ankaŭ la 1,600-kilovata hidraŭlika turbino instalita en la hidroelektra stacio Kingtong estis produktita de kelkaj malgrandaj fabrikoj de Luoding-gubernio.



Printempo ĉe Hingkaj-lago

EN la printempo, ĉijare, ni vizitis la landliman regionon ĉe Hingkaj-lago en la Nordoriento. Tie la mondrenversa ŝanĝiĝo kaj noblaj komunismaj virtoj kaj sinforĝesa laborspirito de la malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj fiŝistoj profunde tuŝis nian koron. Ĉi sube ni mallonge rakontos kion ni vidis kaj aŭdis.

NOVAJ HOMOJ EN HINGLONG-BRIGADO

Hinglong-brigado situas fronte al Hingkaj-lago kaj dorse al Mifeng-monto. Kaj ĉirkaŭ ĝi sin etendas vasta nigra graso tero. De 20 jaroj, sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ĝiaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj propramane konstruis la lokon en novan socialisman montvilaĝon riĉan kaj belan. Nun ĉie ĉi tie regas prospero. En la vilaĝo funkcias rizmuelejo, olepremejo, elementa lernejo kaj vendejo; vicoj da rondaj grentenujoj staras unu post alia kontraŭ la lago... Vidante tion, ni ne povis ne laŭdi la novan kaj belan Hinglong. Tamen, la plej novaj kaj bonaj estas la homoj de Hinglong!

Komunumano-malriĉkamparano Ĝang rakontis al ni kortuŝajn farojn de tieaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en sinforĝesa laboro por konstrui la hejmlokon.

Oni estime nomas maljunan malriĉkamparanon Ĝaŭ Ginhiu, kiu estas preskaŭ 60-jara, fera viro. En 1945, kiam la brilo de la ruĝa suno lumigis la bordon de Hingkaj-lago, li ĝojiĝis ĝis larmado.

Li diris antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ: "Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ, vi estas la granda savanto de ni malriĉuloj. La de vi montritan vojon ni iros definitive!" De tiam li aktive kaj firme iris la vojon de agrikultura kolektivigo de interhelpa grupo kaj kooperativo ĝis popola komunumo, sekvante la revolucian linion de Prezidanto Maŭ.

Nun tre feliĉe vivas la familio de Ĝaŭ Ginhiu. Konsiderante la malfortecon de lia maljuna korpo, lia edzino konsilis lin emeritiĝi, sed li firme rifuzis: "Kvankam mi estas maljuna, tamen mia spirito ankoraŭ ardas por daŭrigi la revolucion; mi laboros por la socialisma afero almenaŭ tridek jarojn!" Krom partopreno de kolektiva produkta laboro, li laboris samtempe kiel tenejisto de la produkta grupo, tiel ke li estis tre okupita de la mateno ĝis la vespero. Ĉiuj varme nomis lin "ruĝa intendanto de socialismo".

La maljuna generacio ne haltas sur la vojo de daŭra revoluciado kaj la nova generacio plena de heroo fervoro marŝas renkonte al estonteco. En la printempo de 1968, diplomiginte en higiena lernejo, Ĝang Ŝukin revenis al sia hejmloko. Kiam ŝi paŝis en la oficejon de la brigado kun medikamenta kesto pendanta sur la ŝultro, tuj bolis la ĉambro. Informiginte pri ŝia reveno, najbaraj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj venis por ŝin vidi kaj alrapidis de la kampoj ankaŭ la maljuna sekretario de la partia filio. Firme tenante la manon de Ĝang Ŝukin, li kore diris: "Ŝukin, vi

estas bonvena al la partia filio kaj la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj!” La zorgo de la Partio kaj konfido de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj tre kortuŝis ŝin, tiel ke ekbrilis larme ŝiaj okuloj. Ŝi pensis, ke en la damninda malnova socio mankis al la laboranta popolo kuracistoj kaj medikamentoj, kaj la malsano minacis ilian vivon en ĉiu ajn tempo. Post la Liberiĝo, multe ŝanĝiĝis la stato. Sed pro la malhelpo de la kontraŭrevolucia reviziisma higiena linio de la renegato Liu Ŝaŭki, la higiena laboro ankoraŭ direktis sin al urboj kaj servis nur al mal-

multo. Nur la senprecedenca Granda Proletara Kultura Revolucio komplete likvidis la krimegon de Liu Ŝaŭki faritan al la laboranta popolo. Sub la direktado de la granda instrukcio de Prezidanto Maŭ “**meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon**”, granda nombro da kuracistoj kaj flegistoj iris de urboj al la kamparo, multaj vilaĝaj kuracejoj aperis kvazaŭ fungoj post pluvo kaj en multaj lokoj stariĝis koopera kuracservo tiel ke estas garantiata la sano de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. El ĉio ĉi tio Ĝang Ŝukin pli sentis la saĝecon kaj



*Fiŝkaptado
sur glacio*



Virinoj de la produkta grupo Juegin en studo

grandecon de Prezidanto Maŭ kaj senkomparan superecon de la socialisma sistemo, kaj samtempe la gravecon de sia respondeco. Espriminte sian decidon al la maljuna sekretario ne vanigi la esperon de la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj, ŝi iris rekte al kuracejo de la brigado kaj tuj komencis sian laboron.

En sia laboro, ŝi firme sekvas la grandan instruon de Prezidanto Maŭ **“komplete sindoni al aliaj sen ajna konsidero pri si mem”**. Por forigi suferojn al la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj ŝi volonte oferas ĉion sian, kaj pro tio la amasoj unuvoĉe laŭdis ŝin kiel homon sindonan al kolektivo.

FRUE VENAS PRINTEMPO AL LIJUGANG

En bela printempa tago ni venis al Lijugang, kies pitoreska pejzaĝo montvilaĝa tre ĉarmis nin. Ankaŭ la mieno de la komunumano-malriĉkam-

parano Ĝang, kiu nin akompanis, montriĝis tre ĝoja. Li rakontis al ni pri la granda ŝanĝiĝo de Lijugang. Antaŭ la Liberiĝo, en la vilaĝo ĉie regis dezerteco. Kelkaj kadukaj kabanoj, kies muroj enlasis venton, dise lokiĝis sur etendaĵo de la lagbordo. Tiam la fiŝtiranoj, bienuloj kaj japanaj agresantoj loĝantaj en la urbo ofte sendis homojn por preni fiŝojn. Se la fiŝoj ne sufiĉis por la difinita kvanto, la fiŝistoj estis draŝitaj aŭ eĉ dronigitaj en la lago ĉe grava kazo. En vintro, kiam la lago glaciĝis, muĝis frosta vento kaj la temperaturo falis ĝis pli ol 40° C sub la nulo, la japanaj agresantoj ankoraŭ devigis ilin per bajoneto fiŝkapti en la lago. Pro manko de vesto kaj manĝo, fiŝistoj ofte svenis sur la glacio en ventego kaj neĝo. En la okuloj de la damnindaj japanaj diabloj, ĉinoj ne valoras pli ol fiŝoj: piede forpuŝinte la sveninton, ili ekprenis la fiŝojn kaj foriris. Tiam la malriĉaj fiŝistoj tagnokte sopiris al saviĝo kaj liberiĝo...

La malfeliĉaj rememoroj firme kaptis nian koron. Viŝinte al si la okulojn, maljuna Ĝang daŭrigis: "Poste, Lijugang liberiĝis. La popola registaro donis al ni nombron da fiŝkaptaj boatoj kaj kvanton da mono por ke ni helpu nin mem per produktado. Kaj plie ĝi ankaŭ konstruis por ni vastajn kaj helajn loĝdomojn, funkciigis vendejon, instalis elektrajn lampojn kaj fadenan disaŭdigan sistemon kaj starigis lernejon por niaj gefiloj. Nun en nia Lijugang prospere disvolviĝas agrikulturo, forstado, paŝtado, flankaj okupoj kaj fiŝado." Ju pli li rakontis, des pli li entuziasmiĝis. Frapante nian ŝultron li kore diris al ni: "Bonvolu veni denove en somero, tiam estos bona sezono por fiŝkaptado."

FLORO DE DAĜAJ ĈE HINGKAJ-LAGO

Ĉe Hingkaj-lago ruĝas floro de Daĝaj. Ĉi tie ni prezentos al vi nur avangardajn farojn de

Juegin-produktogrupo meminiciate fondita de dommastrinoj, kiuj lernas kaj agas kiel Daĝaj-anoj.

En la malnova socio, la dommastrinoj ne havis politikajn rajtojn. Post la Liberiĝo, sub la intima zorgo de Prezidanto Maŭ, ili iris al la socio por partopreni produktajn kaj politikajn aktivadojn kaj kontribuis en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. En mallonga tempo de kvar jaroj post sia fondiĝo en 1967, Juegin-produktogrupo, prenante Daĝaj-anojn kiel ekzemplon, kulturebligis 480 muojn da dezerta tero kaj liveris al la ŝtato 620,000 ĝinojn da rizo, sinapogante sur propraj fortoj kaj peneme luktante en malfaciloj. La pomua produktokvanto de greno en la pasinta jaro atingis 510 ĝinojn. Samtempe kun pliiĝo de la kontribuo farita al la ŝtato, ankaŭ ĝia kolektiva ekonomio multe disvolviĝis. La grupo aĉetis por si elektran motoron, draŝ-maŝinon, herbodistranĉan maŝinon, muelilon kaj aliajn mezgrandajn kaj malgrandajn agrikulturajn instrumentojn. La komuna akumulo superis 17,000 juanojn.

Ĝang Ŝukin (maldekstre) faras kuracon al komunumano en kampo.



Granda estas la atingo de Juegin-produktogrupo, sed la vojo, kiun ĝi trairis, estis plena de akraj bataloj. En la komenco de 1967, sub la gvido de la kompartiano Li Fu-nju la 52 dommastrinoj organizitaj en la produkta grupo decidis reformi la sudan grandan kavon en kampojn. Informiginte pri tio iuj ne kredis, ke ili sukcesos tion fari. Studinte la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “Ŝanĝiĝis la epoko, viroj kaj virinoj estas egalaj, kaj kion la viro povas fari, tion povas ankaŭ la virino”, la grupanoj kritikis dekstreman konservativan penson kaj starigis al si la bravan decidon same fari kiel Daĝaj-anoj. En tiu printempo la grupo ekmarŝis al la kava areo ĉe la bordo de Hingkaj-lago en la ruĝa ŝtormo de la Granda Proletara Kultura Revolucio, banate de la brilo de Maŭzedongpenso.

Por realigi la planon estis multaj malfaciloj, antaŭ kiuj la virina grupo faris ŝtalan ĵuron: “La ĉina popolo ne timas eĉ morton, ĉu ĝi timos malfacilojn? Se ni nur aŭskultos vortojn de Prezidanto Maŭ kaj lernos de Daĝaj-anoj, ĉiajn ajn malfacilojn ni povos venki!” Spite al ventego kaj neĝo ili kulturebligis la teron. Krome, por solvi la problemon de irigacio, ili decidis fosi kanalon post ripetada mezurado kaj enketado.

En aprilo tie frosta vento pikis ĝis ostoj. Sur la laborloko, glacio miksiĝis kun kotakvo, tiel ke supre de la tero estis koto kaj sube estis firme frostita grundo necedanta al frapoj de ŝoveliloj kaj pioĉoj. La piedoj de iuj vundiĝis de glacipecoj kaj la manoj de aliaj sveliĝis pro frosteco, tamen ili daŭre persistis en la laboro, laŭte recitante “Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon”. Homoj armataj per Maŭzedongpenso havas la plej grandan batalforton. Post penega laborado de pli ol 20 tagoj, ili fine fosis trunkan akvokondukan kanalon kun longeco de pli ol 2,000 metroj. Post batalo de unu jaro, ili akiris la unuan riĉrikolton de 120,000 ĝinoj da rizo en aŭtuno.

En 4-jara irado sur la larĝa vojo de “lerno de Daĝaj en agrikulturo” montrita de Prezidanto Maŭ, Juegin-produktogrupo atingis elstaran sukceson, kaj pro tio la Partio kaj la popolo donis al ĝi altan honoron. En 1970 la grupo kiel avangarda kolektivo glorie ĉeestis la Kongreson de la Aktivuloj en Viva Studo kaj Viva Apliko de Maŭzedongpenso de Hejlonggiang-provinco. La grupo fariĝis ruĝa flago sur la virina fronto kaj estas laŭdata kiel “freŝa floro de Daĝaj”.



Kuraci Ĉevalojn

IU flava ĉevalo de nia roto mortis pro “sabloakumuligo”. Per la brila filozofia penso de Prezidanto Maŭ, la partia filio gvidis la tutan roton diskuti pri la temo “kion fari post la akcidento?” kaj fari enketon, trovis la kaŭzon de la morto de la ĉevalo, resumis sperton de kuraco de ĉevalo suferanta de “sabloakumuligo” kaj savis 100 ĉevalojn de sama malsano. La rezulto estas: Post la morto de unu ĉevalo cent malsanaj ĉevaloj estis savitaj; la malbona afero turniĝis en bonan aferon.

MALBONA AFERO KONDUKIS AL BONAJ REZULTOJ

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas al ni: “Multaj aferoj povas fariĝi nia balasto aŭ ŝarĝo, se ni nur falis en blindecon pri ili kaj perdis memkonscion.” Nia roto estas transporta roto kaj ekde sia fondiĝo ĝi sekure veturadis 1,080,000 kilometrojn sen ia ajn akcidento, kaj ĝi fariĝis ruĝa standardo en nia regimento. Sed ĉifoje mortis la flava ĉevalo kaj ĉiuj sentis premitecon en sia spirito.

Iuj diris: “Nun falis la ruĝa standardo kiun nia roto tenadis dum 8 jaroj.” La partia filio opiniis, ke iuj el la kamaradoj ne konis la veron ke du kontraŭdiraj flankoj transformiĝas unu en la alian sub certaj kondiĉoj kaj trafite de malsukceso ili deprimiĝis kaj ne volis aktive akceli la malbonan aferon turniĝi en bonan aferon. Tial la partia filio gvidis ĉiujn studi ripetade la instruon de Prezidanto Maŭ “**Ni devas ellerni rigardi problemojn ĉiuflanke, ne nur la pozitivan flankon, sed ankaŭ la negativan flankon de aferoj. Sub specifaj kondiĉoj, malbona afero povas konduki al bonaj rezultoj, dum bona afero ankaŭ povas konduki al malbonaj rezultoj.**” La politika direktanto de nia roto diris: “Ĉe ni mortis unu ĉevalo, tio estas perdo; sed se ni trovis la kaŭzon de ĝia morto kaj ne lasos niajn ĉevalojn kaj ĉevalojn de aliaj frataj rotoj morti poste, ni povas diri rigardante tion el la tuto, ke la malbona afero povos turniĝi en bonan aferon.” Dank’ al la studo ĉiuj altigis sian konon, forjetis pensan balaston kaj firme esprimis: Ni nur devas nin kuraĝigi, sed neniam deprimiĝi. Ni nepre eltrovu la kaŭzon de la morto de la ĉevalo kaj turnu la lecionon de nia roto en ĝeneralan sperton.

ENKETO JA ESTAS SOLVO DE PROBLEMO

Pro kio mortis la flava ĉevalo? Tiam ni ankoraŭ ne klare konis la kaŭzon. Ni sekis la ĉevalon kaj trovis 14 kilogramojn da sablo amasiĝinta en dika parto de la duodeno kaj aliaj intestoj. Tion vidinte, vilaĝanoj diris, ke tio estas “sabloakumuligo”. Sed kial okazas “sabloakumuligo” al ĉevalo? Ni ne sciis kaj ankaŭ nia veterinaro ne aŭdis pri tio. Ni kaprompe pensadis, sed ne trovis respondon. Ni foliumis multajn veterinarajn lernolibrojn, sed ankaŭ tie ne trovis respondon. Prezidanto Maŭ instruas al ni: “**Ĉu vi ne povas solvi iun problemon? Faru do enketon pri ĝia nuna stato kaj ĝia historio! Kiam pere de enketo vi plene konis la aferon, vi jam trovos rimedon por solvi ĝin.**” Observante la instruon de Prezidanto Maŭ, ni profunde iris inter la amasojn kaj faris enketon ĉe multaj malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj, spertaj bredistoj kaj lokaj veterinaroj ĉirkaŭ nia garnizonejo. Maljuna ĉevalbredisto, kiu paŝtis ĉevalojn pli ol 40 jarojn, diris al ni: “‘Sabloakumuligo’ estas loka malsano de ĉevalo. Ĉevalo englutis multe da sablo, kiu amasiĝis en

dika parto de duodeno kaj obstrukcis la intestojn. ‘Sabloakumuligo’ estas ne danĝera, kaj se oni atente kuracos, la malsana ĉevalo povos esti resanigita.” Ni demandis lin pri kuraco de tia malsano kaj li diris: “Estas tre facile. Vi bezonas nek injekti, nek doni medikamenton, sed nur englutigi al ĝi melograson aŭ porkograson, kaj en du horoj ĝi certe eligos la sablon kaj resaniĝos.” Kaj ni petis la maljunan brediston klarigi, kial la ĉevalo englutis sablon. Li diris, ke ni manĝigis al ĝi nesufiĉan salon. Ĉe nia antaŭa garnizonejo la akvo estas sala, tial sufiĉis 20 gramoj da salo por ĉiu ĉevalo ĉiutage, sed ĉe la nuna garnizonejo la akvo estas dolĉa, do tiu kvanto ne sufiĉis. Tamen la grundo estas iom sala, tial la ĉevaloj mordis la grundon kaj englutis multe da sablo. Prezidanto Maŭ diris: “**Enketado similas al longaj monatoj de gravedeco, kaj solvo de problemo al la tago de akuŝo. Enketi ja estas solvi problemon.**” Lernante la riĉan praktikan sperton kaj sciencan analizon de malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj, maljunaj bredistoj kaj lokaj veterinaroj, ni sentis la instruon de Prezidanto Maŭ eksterordinare intima, senlime eminenta kaj ĝusta.

LECIONO EN LIMIGITA PARTO FARIĜIS ĜENERALA SPERTO

“**La eraroj kaj la repuŝoj nin instruis, tiel ke ni fariĝis pli saĝaj kaj faris niajn aferojn pli bone.**” En la sesa tago post la morto de la ĉevalo, iu ĉevalido en nia roto malsaniĝis je sama simptomo. Ni englutigis al ĝi duonkilogramon da graso kaj ĝi elfekis 4 kilogramojn da sablo kaj rapide resaniĝis. En tiu tempo ankaŭ aliaj 37 ĉevaloj de nia roto suferis de tia malsano kaj ni kuracis ilin per sama metodo. Ni raportis pri tio al supera partia komitato kaj ĉevalbreda sekcio, kaj 100 ĉevaloj de tiu malsano estis kuracitaj. Laŭ sperto de lokaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj akumulita en multjara bredado, ni donas al ĉiu ĉevalo 50 gramojn da salo en ĉiu tago, sekve de kio la ĉevaloj ne plu englutas sablon kaj tiu malsano estas preventita.

Niaj frataj rotoj diris: “La transporta roto laboris 8 jarojn sen akcidento, kio donis al ni valoran lecionon; nun kvankam mortis ĉe ili unu ĉevalo, ili tamen lerte resumis sperton per la brila filozofia penso de Prezidanto Maŭ kaj savis 100 ĉevalojn, kaj ankaŭ tio donis al ni valoran lecionon.”



BREDI PORKOJN SUR ALTEBENEJO

La popola komunumo Kesong de Najdong-gubernio de la Tibeta Aŭtonoma Regiono aktive disvolvas porkbredadon kaj akiris sperton de porkbredado sur altebenejo, kio efike antaŭenpuŝis la porkbredadon de la tibeta popolo.

En la pasinteco la tieaj popolanoj ne kutimis bredi porkojn kaj ne havis sperton en tio, tial la agrikulturo estis iom malbone influita. Sed, post penado en 5 jaroj, nun meznombro ĉiu membro de la komunumo bredas preskaŭ 1 porkon.

Tie estis loka speco de porko kun maksimuma pezo de 25 kilogramoj. Komunumanoj krucigis tiajn porkojn kun grasa speco enportita el alia provinco kiu ne povas akomodiĝi al la klimato de altebenejo. La

provo sukcesis. La hibridaj porkoj povas kreski ĝis 75-100 kilogramoj kaj la plej granda pezas 150 kilogramojn. Ili tute akomodiĝis al la klimato de altebenejo.


La disvolviĝo de porkbredado liveras pli da sterko kaj akcelas la disvolvon de agrikulturo. La komunumanoj povas manĝi pli multe da porkaĵo anstataŭ ŝafviandon, tiel ke plimultiĝis la ŝafaroj.

EKSTRAKTI AZELAN ACIDON EL SILKRAŬPA PUPO

La Silka Fabriko de la gubernio Muping de Ŝandong-provinco disvolvis sintezan utiligadon de materialoj kaj sukcesis ekstrakti azelan acidon el silkraŭpaj pupoj, per kio ĝi malfermis novan fonton de krudmaterialo por disvolvo de la kemia industrio de nia lando.

Azela acido estas krudmaterialo por konstruaj plastajoj. La konstruaj plastajoj el tia krudmaterialo eltenas frotadon, oleon kaj akvon. Per azela acido oni povas fabriki ankaŭ nilonajn objektojn vaste uzatajn en industrioj de radioaparato, maŝinfabriko kaj aliaj.

Navigas sur oceano la 15,000-tonela ole-ŝipo "Daking 29", kiun konstruis la Ŝanhaja Hongki-a Ŝipkonstruejo sinapogante sur propraj fortoj.



Ili Estas

Ordinaraj Laboruloj



Vang Bin (la meza), sekretario de la partia komitato kaj estro de la revolucia komitato de la Kotona Ŝpinteksejo de Jinĉuan, deĵoras kune kun aliaj laboristinoj en la ordigejo.



Vang Venking (la unua de maldekstre), sekretario de la partia komitato de Hiangtan-gubernio, Hunan-provinco, interkonsiliĝas en la kamparo kun malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj pri demandoj en revolucio kaj produkto.





Ŝaŭ Guanfa (la maldekstra), sekretario de la partia komitato de Dongfeng-gubernio, Gilin-provinco, konstruas akvoservejon kune kun malriĉkampaĵoj kaj malsuperaj mezkampaĵoj en Jangmulin-komunumo.

Post ekzerca flugado, Ĝang Jumej, vicestro de aereskadro, diskutas pri la farita flugado kun siaj kamaradinoj.



Tibeta kompartiano Danggen, vicestro de la revolucia komitato de Jaŭgin-komunumo en Tibeto.

Lju Julan, sekretario de la partia filio de produkta brigado de Dongliuŝangu de Linhi-gubernio, Hebej-provinco, konstante partoprenas kolektivajn produktajn laborojn.



Li Suven (la dekstra), vicestro de la urba revolucia komitato de Ŝenjang, ofte iras profunde en bazajn unuojn, tenante kompaktan interrilaton kun la amasoj.



Sun Jufang (la dekstra), membro de la partia komitato kaj laboristo-teknikisto de la Ŝanhaja Kompanio de Ŝpinaj kaj Teksaj Maŝinoj, projektas novan ekipaĵon por produkto de kemiaj fibroj kune kun veteranaj laboristoj.





Ĝaŭ Hingmin (fronte), sekretario de la partia komitato de Liaŭjuan-a Elektrejo, Gilin, deveninta de laboristo, persistas en partopreno de laboro kaj fariĝis ekzemplo-donanto de ideologia revoluciigo en la tuta fabriko.

Heroa Roto

—Korespondaĵo el Vjetnamio

LA 3-a roto de Ba Gia-regimento de la Sudvjetnama Liberiga Armeo estas heroa roto, kiu faris multajn batalajn meritojn en la kontraŭ-usona nacistava milito. Dum la pasintaj dek jaroj ekde ĝia fondiĝo, kun ŝtala decido komplete venki la usonajn agresajn rabistojn kaj batalstilo de fulma rapideco la komandantoj kaj batalantoj de tiu ĉi roto tiel solide batis la uson-pupajn trupojn ke ĉi tiuj terurigas je mencio de ilia roto.

En iu nokto, roto da pupaj armeanoj profunde dormantaj en fortikaĵo estis surprizitaj de eksplodo de pulvo-pako. Kiam la malamikoj ankoraŭ ne akiris klaran ideon pri la okazaĵo, la batalantoj de la 3-a roto jam aperis ĉe iliaj litoj. 15 minutojn

poste, pafado ĉesis. Malfermite la pordon, loĝantoj ellitiĝintaj en la urbo vidis, ke dekoj da kaptitaj puparmeanoj deprimate trapasas la straton sub eskorto de liberigaj armeanoj.

Alifoje, la 3-a roto embuskis en ĉirkaŭurbo de Da Nang kontraŭ la usonaj agresaj trupoj. Roto da usonaj armeanoj eniris en la embuskejon de la 3-a roto. La estro de la 3-a roto tuj saltis el la tranĉeo kaj kriis: "Sturmu!"

La tuta batalantaro de la roto fulmrapide sin dividis en tri grupojn kaj sieĝis la malamikojn. Plotonestro Nguyen Minh Chau gvidis siajn batalantojn sturmi la unuajn. Ili faligis unu malamikon



Batalantoj de la Sudvjetnama Liberiga Armeo forte batas usonajn aerajn banditojn.



Batalanto de la Sudvjnama Liberiga Armeo donas solidan baton al la malamikoj.

post alia per siaj karabenoj. Subite, la malamikoj blokadis ilian vojon per peza maŝinpafilo. Batalanto Cong sagace rampis dekstren kaj likvidis tiun pafpozicion per unu sola raketo.

Ĉe la maldekstra alo plotonestro Khang kaj batalantoj luktis kontraŭ la malamikoj. Ĉirkaŭ 10 usonaj armeanoj grupiĝis kaj intencis forfuĝi. Batalanto Phung Gia Ngu tre rapide sin ĵetis post la dorson de la malamikoj kaj pafis salvon da kugloj al ili, kaj grasaj usonaj agresantoj falis teren unuj post aliaj. La restintaj en konsterniĝo levis siajn tremantajn manojn, kriante per la vjetnama lingvo: "Tha chet, xin dau hang! Tha chet, xin dau hang!" (tio signifas: "Ŝparu mian vivon, mi kapitulacos!") Tre rapide finiĝis la embuska batalo.

La batalantoj de la 3-a roto profunde komprenas, ke en batalo la decida faktoro de venko estas la homo kun pafilo. En la lastaj 10 jaroj, la batalantoj de la 3-a roto ĉiam disvolvis la spiriton de la revolucia armeo decideme batali kaj venki kaj turnis tiun spiriton en agadon de venko super la malamikoj kaj en batalstilon fari bajonetan kaj eksterman batalon, kaj teruris la malamikojn per mortaj batoj.

Akirinte brilajn venkojn en senĉesa atakado kontraŭ malamikoj en lokoj S. N. K. B. kaj aliaj, la 3-a roto akceptis novan batalan taskon. Iun tagon, 2 rotoj da malamikaj armeanoj, kiuj iris

al V-areo por savi siajn kunulojn, falis en la embuskan reton de la 3-a roto. La malamikoj dividiĝis en du kolonojn. La unua konsistanta el unu roto kaj 8 kirasitaj veturiloj kuris fronte al la pozicio de la 3-a roto. Kaj la dua el 1 roto kaj 4 kirasitaj veturiloj rampis en la maldekstra flanko.

Post kiam la kontraŭtankisto Hoi ruinigis la unuan kirasitan veturilon, la malamikoj post ĝi ne kuraĝis sin movi antaŭen eĉ unu paŝon. Kapitante la ŝancon, la rotestro kaj politika direktanto tuj saltis el la pozicio kaj gvidis la kunbatalantojn sturmi. Subite surprizite, la malamikoj morte timigitaj forkuris tretante siajn vunditajn aŭ mortintajn kunulojn. Ankaŭ la aliaj kirasitaj veturiloj sin returnis kaj forkuris. La batalantoj de la 3-a roto dividiĝis en multajn batalajn grupojn kaj daŭre persekutis en venko la malamikojn.

Tiam, 4 usonaj aviadiloj ĵetis brul-bombojn, intencante bari la vojon de la antaŭenmarŝanta Liberiga Armeo. La direktanto sturmis la unua laŭte kriante: "Sekvu min, kamaradoj! Ne lasu la malamikojn forkuri!" Ĉirkaŭirinte flamojn, ili sin ĵetis en densan pulvofumon por daŭre persekuti.

Aro da malamikoj obstine rezistis per peza maŝinpafilo sin ŝirminte post falinta konstruaĵo. La rotestro kun batala grupo sub sia gvido kaŝe sin movis post la dorson de la malamikoj kaj neatendite

ekstermis per mangrenadoj la maŝinpaŝan grupon de la malamikoj. La batalantoj de la 2-a plotono daŭre sturmis antaŭen kaj komplete ekstermis la aron da malamikoj.

Post kiam la unua kolono de la malamikoj estis ekstermita, la dua atakis de maldekstre kontraŭ la pozicio de la 1-a plotono. La malamikoj jam proksimiĝis. 2 kirasitaj veturiloj sin puŝis pli rapide al la pozicio de la 1-a plotono. Kontraŭ-tankisto Hai ruinigis unu el ili per unu obuso, sed la alia daŭre riske puŝiĝis antaŭen. Plotonestro Cong ordonis Hai daŭre pafi. Proksime de ili eksplodis bombo alpaŝita de la malamikoj, ili ambaŭ estis vunditaj.

La kirasita veturilo daŭre veturis antaŭen. Cong penis stariĝi, tamen li ne povis stari firme pro la vunditaj gamboj. "Se nur ni ankoraŭ vivas, la malamikoj do ne povas forkuri." Tion pensante, li sentis sin pli forta. Kunpremante la dentojn kaj sin apogante sur la muron de la fosaĵo, li klopodis por sin stariĝi kaj prepari al batalo kun mangrenado.

Baldaŭ la kirasita veturilo preterkuros dekstre de Cong. Se li ĵetos mangrenadon, ĝi probable ne trafos la celon. Ĉe tiu urĝa momento, koncen-

trinte sian tutan forton en la brakojn, li tre rapide sin tiris supren el la fosaĵo per siaj du manoj kiel en ludo de reko, kaj ruliĝis malsupren de la taluso al flanko de la kirasita veturilo kaj metis mangrenadon sub la raŭpon de la veturilo. Tondre eksplodis la mangrenado kaj la kirasita veturilo de la malamikoj paraliziĝis.

Lia brava ago ege kuraĝigis la batalantojn de la tuta plotono. Vicplotonestro Nhuong tuj gvidis la batalantojn sturmi antaŭen kaj kunagante kun la 2-a kaj 3-a plotonoj, ekstermis la duan kolonon de la malamikoj. La batalo rapide finiĝis, kaj sur la kampoj plenaj de bombkavoj ĉie kuŝis senorde kadavroj de la malamikoj.

Dum la lastaj 10 jaroj, la komandantoj kaj batalantoj de la 3-a roto ĝuste tiel faris preskaŭ 100 batalojn per ordinaraj armiloj kontraŭ usonaj agresaj trupoj, pupaj trupoj kaj komplikaj trupoj kun modernaj ekipaĵoj, mortigis 2,300 malamikojn (inkluzive de 620 usonaj armeanoj), kaptis preskaŭ 200 malamikojn, faligis 6 malamikajn aviadilojn, militakiris proksimume 400 diversspecajn armilojn kaj ricevis honoran titolon "Kupra Unuo kun Decidemo de Venko" donitan de la komandejo de la Sudvjjetnamaj Liberigaj Armitaj Fortoj.



LA LAOSA LIBERIGA ARMEO EKSTERMIS PRESKAŬ 2 MALAMIKAJN BRIGADOJN

Post la brila venko en la 17-a de marto, en kiu la Popola Liberiga Armeo en suda Laoso ekstermis 1 kompletan malamikan regimenton sur la altaĵo 723, la Liberiga Armeo daŭre marŝis antaŭen en la venko, sieĝis kaj furioze atakis la saĝonajn pupajn trupojn en la regiono de Ban Dong ĝis Kaki-ponto, komplete ekstermis preskaŭ 2 malamikajn brigadojn kaj tute okupis Ban Dong.

La malamikaj trupoj okupintaj Ban Dong estas la ĉefa forto de la saĝona pupa armeo en agreso al la suda parto de Laoso, inter kiuj estis la 7-a,

11-a, 4-a kirasaj regimentoj de la unua kirasa brigado de speciala misio kaj la unua paraŝuta brigado kaj kelkaj aliaj paraŝutaj batalionoj. Tiuj pupaj trupoj dislokiĝis en multaj punktoj de Ban Dong ĝis Kaki-ponto.

En la 18-a de marto, sub la forta helpo de artillerio kaj kontraŭaeroplana kanonaro, la infanteriaj kaj kirasaj trupoj de la Laosa Popola Liberiga Armeo faris potencon ofensivon kontraŭ la malamikoj en Ban Dong. Post daŭra batalo en kelkaj tagoj, ĝis antaŭtagmezo de la 24-a de marto, la Laosa Popola Liberiga Armeo komplete ekstermis la unuan paraŝutan brigadon kaj plejparton de la unua kirasa brigado de speciala misio de la saĝona pupa armeo, kaptis multajn malamikojn kaj kaptis multajn armilojn kaj militajn materialojn.

La informo de la Laosa Popola Liberiga Armeo je la 24-a de marto diris: De la 8-a de februaro ĝis la komenco de marto, la laosa armeo kaj popolo ekstermis 16,000 malamikojn sur la batalkampo en suda Laoso.

LA KAMBOĜA ARMEO KAJ POPOLO EKSTERMIS 170,000 MALAMIKOJN EN UNU JARO

Per brava batalo en unu jaro, la kamboĝa armeo kaj popolo ekstermis 170,000 malamikojn de la usona armeo kaj la pupaj armeoj de Sajgono kaj Lon No1, inter kiuj ĉ. 70,000 estis usonaj armeanoj kaj sajgonaj puparmeanoj. La kamboĝa armeo kaj popolo nuligis kaj forte batis la komandejojn de 3 malamikaj militaj distriktoj kaj 7 militaj subdistriktoj, ekstermis, grave difektis kaj diserigis preskaŭ 170 batalionojn aŭ unuojn egalajn al bataliono, centon da rotoj kaj pli ol 20 kirasajn taĉmentojn, inter kiuj 6 korpusoj kaj 3 brigadoj de la pupaj armeoj de Sajgono kaj Lon No1 estis grave difektitaj aŭ diserigitaj. La kamboĝa popolo kaj la naciliberigaj armitaj fortoj faligis kaj detruis pli ol 900 diversajn aviadilojn de la malamiko, dronigis


pli ol 250 malamikajn ŝipojn, difektis pli ol 5,200 malamikajn militajn veturilojn inter kiuj estis pli ol 3,200 tankoj kaj kirasautoj, forbruligis kaj eksplodigis pli ol 130 municiejojn kaj benzinejojn, detruis pli ol 500 kanonojn kaj diversajn aliajn armilojn. La kamboĝa popolo kaj la naciliberigaj armitaj fortoj kaptis multe da armiloj, municio kaj diversaj veturiloj.

LA VJETNAMA ARMEO KAJ POPOLO PAFFALIGIS USONAN AVIADILON DE TIPO B-52

En la 17-a de marto la usona imperiismo refoje sendis aviadilojn B-52 por freneze bombadi iujn lokojn de la regiono Vinh Linh. La trupo kaj popolo de la regiono brave batalis kaj faligis 1 usonan aviadilon B-52, donante fortan baton al la usonaj aeraj rabistoj.

Paraŝutaj soldatoj de la sajgonaj pupaj armeoj kaptitaj de la popola liberiga armeo sur la suda bataalkampo de Laoso.





Oleŝipo de la usona kaj pupa armeoj kanone trafita de la Kamboĝaj Naciliberigaj Armitaj Fortoj estas en brulado sur Mekong-rivero.



**LETERO DE FINLANDA
LEGANTO V. P.**

Via revuo estas tre interesa kaj brile ilustrita. La enhavo estas riĉa kaj en ĝi bone speguliĝas la intensa konstruado de via lando kaj la giganta forto de la komunismo. Mi tre admiras vian diligentecon en via laboro.

Mi opinias, ke via taktiko kontraŭ usonaj krimoj kaj kruelagoj en Azio, precipe en Vjetnamio, estas ĝusta kaj rezultos fine al tio, ke la usonaj agresantoj devos retiri siajn militajn fortojn de Azio. Azio apartenas al azianoj kaj vi certe venkos.

**LETERO DE SVEDA
LEGANTO J. H.**

N-ro 1 de EPĈ por la nuna jaro estas eksterordinare valora kaj mi ŝatas ĉion en ĝi. Saman prijuĝon mi havas al la n-roj 2 kaj 3 ĉi-jaraj. El la 3-a numero kaptis min speciale la artikoloj *Vuŝenĝaŭ-stepo en*

Bolado, Nova Entrepreno sur Gobio kaj Gastejo en Profundaj Montoj. Estas emocie legi, per kia entuziasmo laboras la liberigitaj agrosklavoj por fekundigi sian teron, kiel ili batalas kontraŭ kapricoj de la naturo, bridas kaj amikigas ĝin. Mi ankaŭ komprenas, ke tia giganta evoluo fare de la popolamasoj sur ĉiuj branĉoj en via vastega lando estas neebbla sen la gvidado de la hardita Komunista Partio de Ĉinio, kiu baziĝas sur firma fundamento de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso.

**LETERO DE GFR-A
LEGANTO W. S.**

Ĝus mi ricevis vian EPĈ, kiel saluton el malproksima lando.

Mi ĉiam ĝojas pro la pensoj de via Prezidanto Maŭ Zedong, kiujn mi nun devas legi kaj studi kaj deziras danki por tio al viaj ĉinaj esperantistoj. Ili montras al mi la vivmanierojn de la plej vigla kaj la plej progresema lando en la tuta mondo. Mi sciis pri multaj vizitoj de la diversaj registaraj delegacioj. Vi sciigas min pri nova prezentado de la revoluciaj modelaj teatraĵoj, kiuj estas procezo de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso kaj samtempe reliefigas bone la heroajn figurojn de la proletaro.

**LETERO DE GDR-A
LEGANTO W. W.**

Ĝus mi sciigis el la novaĵoj de la radiostacioj ke via lando lanĉis sian duan artefaritan tersateliton. Okaze de ĉi tiu ĝojinda novaĵo mi gratulas al vi tre kore. Samtempe mi deziras al via diligenta popolo pluajn grandajn sukcesojn.

**LETERO DE ALBANA
LEGANTO S. S.**

Saluton al vi! Mi estas nova leganto de via revuo. Lastatempe mi ricevis la duan numeron de EPĈ. Precipe mian intereson vokis du artikoloj kun politika enhavo je la lastaj paĝoj.

La albana popolo kaj junularo rigardas la grandan Ĉinion kiel la plej fidelan subtenanton de la monda revolucio. Ambaŭ niaj komunismaj partioj jam forĝis neestingeblan kaj neelĉerpeblan amikecon inter niaj popoloj. Nia afero, afero de socialismo kaj komunismo, certe venkos! Ni antaŭenmarŝos sur la vojo de plenkonstruo de niaj landoj, kontraŭstarante imperisman kaj reviziisman blokadon kaj forte subtenante la revolucionan batalon de la monda proletaro kaj subpremataj popoloj.

Sur la kovrilo:

Ruĝaj gvardianetoj lernas labori.

Sur la dorskovrilo:

Sporta aktivado de la Dua Elementa Lernejo de Aŭmen-strato, Ŝanhajo

EL POPOLA ĈINIO

人民中国报

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 6 (155) 1971

Ĉefa Enhavo

Gratulo al la Brilaj Venkoj de la Tri Popoloj de Hinduĉinio en Ilia Nacisava Milito kontraŭ la Usona Agreso

Ordigantoj de la Rivero Hajhe

Ŝi Ĉiam Estas Ordinara Laborulo

Malnova Estro de Gisista Grupo

Aimuhan

Dediĉo de Sia Juneco al la Popolo

Maturiĝo de Iu Mjaŭ-a Batalanto

Reflugado en la Ĉielo

Letero de K-do Nguyen Van Kinh al Ĉina Esperanto-Ligo

Elementaj Lernejoj Mastrumas Terkulturejon

Ĉina Tablotenisa Delegacio en Tokio

La Arĝenta Pilko Komunikas Amikecon

Rapide Disvolviĝas la Lokaj Industrioj en Tibeto

Malgranda Ŝtala Kombinumo de Giaŭdong-duoninsulo

Hidroelektra Stacio sur Kingtong-monto

Printempo ĉe Hingkaj-lago

Kuraci Ĉevalojn

Heroa Roto

Korektoj en la 5-a Numero

1. Sur la 4-a paĝo de la fronta bildserio, en la suba klarigo maldekstre, oni legu anstataŭ "de la Delegacio" (linioj 3-4) "al la Delegacio fare".

2. Sur la 11-a paĝo de la teksto, en la 16-a linio de la dekstra kolono, la punkto post la vorto **granda** devas esti ŝanĝita en demandsignon.

La Laosa Popolo Grandnombre

Ekstermis Usonajn

kaj Pupajn Armeanojn



La komandantoj kaj batalantoj de la dua bataliono de iu laosa trupo, kiuj faris militmeriton en batalo sur Jars-ebenejo, sin preparas por nova batalo.



Komandanto de iu kompanio de la Laosa Popola Liberiga Armeo observas la malamikon ĉe fronta posteno.




En la kampanjo de la ŝoseo n-ro 9, la Laosa Popola Liberiga Armeo komplete ekstermis sur la altejo 723 sudokcidente de Ban Dong la unuan regimenton de la unua infanteria divizio, la ĉefan forton de la saĝona pupa armeo. 13



Heroe batalas soldatoj de la Laosa Popola Liberiga Armeo, forte punante usonajn kaj saĵgonajn pupajn armeanojn.

Trupo de la Laosa Popola Liberiga Armeo sur bataalkampo en suda Laoso pretas rebati usonajn kaj saĵgonajn pupajn agresantojn.





Supre: Batalanto de la Lao-sa Popola Liberiga Armeo eskortas militkaptitajn oficirojn de la tria paraŝutista brigado de la saĝona pupa armeo: (de maldekstre) la brigadestro Nguyehn Van Tho, estro de artileria bataliono Bui Van Chau kaj operacia fakestro Tran Van Duc.

Sube maldekstre: Peze frapitaj saĝonaj pupaj armeanoj fuĝas en paniko.

Sube dekstre: Saĝonaj pupaj armeanoj agresantaj Lao-son kuntirigis terurite.



Batalantoj de la Laosa Popola Liberiga Armeo
laŭte kantas triumfan kanton sur sia posteno.



